HUNGARA VIVO

6
1982
13,–Ft

ORION 1001

STUDIO

NOVA STEREO

Hi·Fi TURO

**SONO,
FIDELO DE
SUPERA GRADO**

- HiFi Stereo—gramofono
- HiFi Stereo—AM/FM tuner
- HiFi Stereo—laŭtigilo
- HiFi Stereo—magnetofono kun kaseto
- Kasetujo de magnetofono
- Diskujo

hi·fi·hi·fi

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 6
(100)

ENHAVO

Opiniaro pri Hungara Vivo (de W.*Auld*, H.*Tonkin*, B.*Kolker*, D.*Blanke*, E.d.*Kock*, K.G. *Linton*) 202
Szeberényi, L.: Szentendre – urbo de l' vidaĵoj (E.*Fenyvesi*) 205
Elem, J.: Ĉu vi konas la piedsignon de l' Profeto? (V. *Benczik*) 208
Benczik, V.: Esperanto-teatroj en Budapeŝto 209
Rajkov, G.–*Elenova*, M.: Infana Esperanto-teatro „D-ro Zamenhof" 211
Szakonyi, K.: Ĉiuj rapidas hejmen (Zs.*Varga-Haszonits*) 213
Boulton, M.: Zamenhofa stilo 215
De Kock, E.: Ekleziaj momentoj 216
Keszi, T.: Ne-skribante 216
Balbin, J.: Liberigo 216
Kořinek, J.: Medito de migranto 216
Knĭchal, O.: Ĉe l'bordo Atlantika 216
Kapitány, L.: Internacia fervojista Esperanto-Kongreso 217
Szabó, I.: Super mi kantas vento 218
Bálint, Sz.: Kristnasko en la nuna Hungario 219
Benczik, V.: Panoramo 220
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 223
D-ro László, F.: La irigacio: evoluanto de la agrikulturo (*E.F.*) 224
Fenyvesi, E.: Murmureto inter muregoj 2. 230
Fejes, M.: Nekrologo pri Sándor Szalay 232
Urbanová, E.: Poeto Jiří Kořinek jubileas 233
Zamenhof, L.: Letero al J.M. Schleyer 233
Kolozsvári-Grandpierre, E.: Tio ne estas tipa, sed okazas (d-ro I.*Nagy*) 235
Recenzoj de V.*Benczik* 236
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 237
Korespondi deziras 238
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 239
Leterkesto 240

Sur la kovrilpaĝo foto de Zoltán *Fejér*

„Tutmonda Sonoro" aperis...

kiel atestas ankaŭ la foto sur la frontpaĝo. Tiu ĉi duvoluma verko estas sendube atuto de la Esperanta tradukarto: pri la kvalito garantias la nomo de Kalocsay, pri la kvanto elokvente informas la reklamo sur p. 212. Kiu ne certigis por si tiun ĉi grandan verkon per antaŭmendo, rapide akiru por si *Tutmondan Sonoron*, ĉar ŝajne la eldonkvanto estis difinita iom pesimisme.

La Redakcio supozas, ke *Tutmonda Sonoro* inde dekoras tiun ĉi jubilean numeron de HV. Jen, ioma statistiko. La cent numeroj (fakte 99, ĉar en 1961 aperis unu duobla numero) ampleksas 3448 paĝojn – kaj ĉirkaŭ 12 kilogramojn... La revuo dum dudek unu jaroj nun havas sian trian redaktoron, kiu sendube atestas pri stabileco. Ĝia eldonkvanto ordinare estas kvarmil ekzempleroj; ĉe la starto tio estis ĉ. dumil. Kvankam la abonantaro konstante kreskis, tamen la kreskado ne havis tre rapidan ritmon, verŝajne pro la kaprica aperado lastatempe. Ne estas hazardo, ke niaj amikoj, kiuj bonvolis – eble iom tro ĝentile – pritaksi nian revuon por tiu ĉi numero, ne povis ne fari kritikan rimarkon pri tio.

Kaj nun fluge pri tiu ĉi numero. Nepre legu la informojn pri la tria Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, kiu okazos inter 19–28 de marto 1982 en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo. Belaj artikoloj prezentas la juvelan urbeton Szentendre, kaj la historian urboparton de Budapeŝto. Du modernaj hungaraj prozaĵoj provas plaĉi al literaturamantoj: la amare-tragika Kristnaska novelo de Károly *Szakonyi*, kaj la humure agordita verko de Emil *Kolozsvári-Grandpierre*.

Mi volas ĉi tie emfazi la gravecon de la alvoko *Verku por komencantoj!* Ĉiuj esperantistaj pedagogoj – ĉu profesiaj, ĉu ne – estas invitataj partopreni en tiu komuna laboro, kiu estas gravega el la vidpunkto de edukado de legantoj por la Esperanta literaturo.

Opiniaro pri Hungara Vivo

Okaze de tiu ĉi jubileo de nia revuo, la Redakcio turnis sin al kelkaj elstaraj esperantistoj dise en la mondo, pri kiuj ni sciis, ke ili estas regulaj legantoj – kelkaj el ili ankaŭ kunlaborantoj – de Hungara Vivo. Nia deziro estis ricevi opiniojn de spertaj personoj pri nia laboro, pri tio, ĉu Hungara Vivo sukcesas plenumi tiujn funkciojn, kiujn ĝi deziras plenumi. La demandoj estis la jenaj:

1. *Kia estas via ĝenerala impreso pri Hungara Vivo?*
2. *En kioma grado Hungara Vivo plenumas siajn du bazajn celojn: unue, esti informilo pri Hungario, kaj due, esti Esperanta kultura revuo?*
3. *Ĉu laŭ via opinio Hungara Vivo faras iun specialan kontribuon, servon al la Esperanta kulturo, kiun en la nuna momento ne povas fari aliaj revuoj?*
4. *Kion vi rekomendas por la estonto?*

William Auld (Britujo), Prezidanto de la Akademio de Esperanto

1. Kiel leganto ekde la unua numero en 1961, mi ĉiam ekĝojas, kiam mi trovas inter miaj poŝtaĵoj novan numeron de HV, ĉar mi scias, ke jen estas kajero, kiun mi ne simple foliumos supraĵe, sed legos preskaŭ ĉiun vorton. Maloftaĵo en mia tro-okupata vivo!
2. Tre bone, laŭ mia opinio; ĉar vidu, oni havas realan sed ankaŭ iom limigitan intereson pri diversaj aspektoj de la vivo en aliaj landoj. Oni legas artikolojn pri Hungario tiom pli volonte kaj kun pli vigla intereso ĝuste pro tio, ke ili aperas inter kaj apud alitemaj artikoloj, kies enhavo interesas ĉiujn esperantistojn. Tial, ŝajnas al mi, la informado eksterlande pri Hungario estas pli sukcesa ol se ĝi estus la sola temo de la revuo.
3. HV havas sian propran spiriton, sian etoson. En la historio de la Esperanta kulturo Hungario ludis specialan kaj elstaran rolon. Ludadon de tiu rolo HV daŭrigas, tiel ke ne okazis rompiĝo en grava nia tradicio, kiu por Esperanto estas speco de kultura ankro.
4. Krom daŭrigi la aktualan linion, akuratigu la aperon de la revuo!

Baldur Ragnarsson (Islando), Vic-prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

1. Mia ĝenerala impreso pri HV estas precize ĉi tiu: ĝi estas antaŭ ĉio substanca revuo, kiu ĉiam alportas tiom da leginda materialo, ke tempomanke elektinte iun artikolon aŭ literaturan verkon por lego, mi ĉiam konscias, ke ankaŭ multaj ceteraj eroj laŭteme ne malpli valoras tralegon.
2. Koncerne la informadon pri Hungario mi ŝatus vidi ankaŭ detalajn artikolojn pri la hungara lingvo kaj sciencajn konsiderojn pri ĝia pozicio antaŭe kaj nun en la Eŭropa lingvaro. Artikoloj pri industrio k.s. ne tre interesas min persone, mi preferus regule vidi detalajn, sistemajn prikribojn de la popola kulturo en Hungario, pri ŝanĝiĝoj en la moderna epoko, pri tio, kiel la hungaroj taksas sin mem kiel popolo, kaj kiel alilandanojn impresas Hungario kaj ĝia popolo, antaŭe kaj nun. Ankaŭ regulajn informojn pr aktualaj eventoj en la lando, kun kritikaj komento. Kiel kulturrevuo el Esperanta vidpunkto HV estas ja elstara. Se ĝi plutenos la nunan nivelon, ne estos kaŭzoj por plendoj!
3. Daŭrigante la lastan frazon mi volas aldoni, ke HV ja povas fari specialan servon al la Esperanta kulturo. Mi ne scias la nombron de abonantoj de la revuo, sed supozas, ke ĝi estas relative alta en la landoj de orienta Eŭropo. Al la esperantistoj en tiuj landoj HV certe daŭre faras kaj espereble ĉiam pli efike faros tre valoran servon, estante aparte konscia pri la Esperanta kulturo sur internacia skalo. Mi nur ŝatus vidi ĝian pli oftan aperon dum la jaro.
4. Al HV kaj al ĝia redakcio mi nur esprimas miajn varmajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de la centa numero.

Humphrey Tonkin (Usono), Estrarano de Universala Esperanto-Asocio

1. Mi trovas ĝian enhavon vere altnivela, kaj ĉiam kun plezuro mi ricevadas kaj legadas ĝin. Ne nur la enhavo estas altnivela, sed ankaŭ la revuo estas zorge presita, bele prezentita, kaj lingve senriproĉa.
2. Ĝuste tiu kombino de esperantisteco kaj hungareco estas apartaĵo de tiu ĉi revuo. Komprenebla, la hungara kontribuo al Esperanto estis, precipe en la jaroj 1920-1960, speciale granda. Sekve, la hungara kulturo fariĝis preskaŭ elemento en la Esperanta kulturo. Kiel leganto de esperantlingvaj libroj, mi sentas min tre proksima al la hungara literaturo, kiun mi konas versajne multe pli bone ol la anglalingvanoj, kiuj ĉirkaŭas min. Mi ĝojas, ke HV daŭrigas tiun Esperantohungaran tradicion.
4. Ke vi daŭrigu laŭ la sama vojo.

Boris Kolker (Sovetio), Ĉefdelegito de Universala Esperanto Asocio por Sovetio

1. HV estas preskaŭ sola esperantlingva kultura kaj socia revuo, kiu troviĝas sur la nivelo de bonaj nacilingvaj revuoj – tio koncernas la enhavon, la prezenton, la lingvaĵon kaj la preson. Ekzisto de tia revuo atestas unuflanke pri altaj kulturaj bezonoj de la esperantista «popolo», kaj aliflanke – pri la altnivela uzo de Esperanto por informadi la mondon pri Hungario.
2. Estas malfacile ekvilibri inter du celoj, sed HV sukcesas tion.
3. La kontribuon de HV en la nuna momento estas malfacile supertaksi. Ĝi devenas unuavice el la seriozeco de la materialoj kun samtempa foresto de snobismo.
4. Mia granda deziro estas, ke la revuo aperu pli ofte kaj pli regule, ke ĝi havu la merititan pli grandan eldonkvanton, ke ĝi presu pli da fotoj, kiuj estu pli bonkvalitaj. Mi opinias, ke, informante pri Hungario, la revuo estu pli varia, sed ne persistu pri samtipaj materialoj. Estus iam interese publikigi enkondukan kurson de la hungara lingvo. Dezirindas pli da materialoj esperantologiaj, i.a. plilingvaj. Kaj estus ne malbone aranĝi lingvan transkontrolon fare de eksterlandanoj: kiom ajn kompetentaj estas la redaktoroj, la influo de la gepatra lingvo foje-foje sentiĝas.

Mi deziras al la revuo iam festi la 1000-an numeron.

Detlev Blanke (GDR), Sekretario de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR

1. Havante ĉiujn numerojn de HV ĝis nun aperintajn, mi konstatas senĉesan evoluon laŭ enhava kvalito, grafika prezento kaj amplekso. Kaj tiu evoluo ja vere signifas ion, ĉar jam en la jaro de la ekapero HV laŭ mi jam estis unu el la plej bonaj atutoj pri kiu la redakcio scias lerte disponi, estas la tradiciriĉa multflanka kaj altevoluinta kultura fono de la hungara Esperantomovado. HV ĉerpis el tiu riĉaĵo kaj samtempe pluevoluigas ĝin en gratulinda maniero.
2. Ambaŭ celoj estas bonege realigitaj en kompleksa unueco. Versajne estas ne tro facile redakti revuon dum multaj jaroj ĉiam nur pri unu lando, pri la propra. Internaciaj revuoj ĉi-rilate eble havas pli da eblecoj. Sed HV trovis laŭ mia opinio tre efikan kaj agrablan manieron prezenti atentokapte la modernan hungaran socialisman vivon, precipe la kulturan, samtempe ĉiam lige al la progresivaj kaj revoluciaj tradicioj. (Ekz. la «Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo» kaj «Jarcentoj de la hungara literaturo».) Disponante pri eminentaj esperantistaj kulturagantoj kaj sciencistoj HV samtempe – kaj prave – prezentas la specife hungaran kontribuon al la esperantlingva kultura kaj scienca agado. Kaj tiu kontribuo, kiel konate kaj aprezate, estas vere tre granda. Tamen, kaj tion mi ŝatus aparte substreki, HV ĉiam trovis internacian linion kaj tiel fariĝis certagrade internacia kultura Esperanto-revuo, kiu digne daŭrigas la tradicion de «Literatura Mondo».
3. Tutcerte jes. Parte mi jam respondis tiun demandon sub 2. Sed mi ŝatus aldoni, ke la seriozeco en la traktado de Esperantaj kaj esperantismaj fenomenoj kaj ankaŭ – feliĉe – ofte la kritika distanco al ili, estas indiko pri la atingita matur-

eco de la revuo. Kaj ĝuste tiu sobra analizemo (tio ne signifas seka) trovebla sur la paĝoj de HV, la kompleksa trakto de la temoj – ĉu la recenzoj mem, artikoloj pri la Esperanta teatro, pri la historio de la hungara laborista Esperanto-movado aŭ pri interlingvistiko – ĉio ĉi kaj similtemaj materialoj estas laŭ mi iu tute speciala neanstataŭigebla kontribuo de HV.

4. Nu – kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas. Estas malfacile rekomendi. Eventuale estus bone legi pli ofte pri interlingvistikaj temoj, pri la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko. Ankaŭ mi jam longe ne plu trovis studojn pri la historio de la laborista Esperanto-movado. Temoj, pri kiuj en Hungario ne mankas bonegaj fakuloj. Ankaŭ estus bonvene, se la Revuo de la Revuoj eble ne tute forgesus iujn pli gravajn Esperanto-periodaĵojn el la socialismaj landoj. Aparte grava laŭ mia opinio estus la eluzo de la fakto, ke HV prezentas kulturajn, ekonomiajn kaj aliajn fenomenojn de la socialisma Hungario kaj sekve daŭre devas krei terminojn adekvatajn al tiu realeco. Iu konstanta terminologia angulo pri la aktuala socia vivo sub socialismaj kondiĉoj aŭ pri socialismaj interpretoj de alilandaj fenomenoj estus certe bona kontribuo al la ellaboro de tiuspeca vortaro. Kaj fine, mi tre ĝojus, se la redakcio iom helpus la landajn asociojn per konvenaj varbmaterialoj, ĉar mi havas la impreson, ke oni malpli varbas por la revuo ol ĝi meritus.

Edwin de Kock (Sud-Afrika Respubliko), poeto

1. Mi trovas ĝin tre kontentiga, ne nur kulture, sed ankaŭ el la vidpunkto de la fizika prezento. Rilate ĉi-lastan aspekton mi atentigas pri tio, ke troviĝas malmultaj revuoj en Esperanto kiuj, kiel HV, atingas la nivelon de la bonaj nacilingvaj. Por mi tiu ĉi punkto estas iom grava. Kiel ajn bonvolema ni akceptas la mankojn materiajn de niaj publikigaĵoj – ofte pro la evidenta monmalhavo ĉe la eldonantoj – ni devas fronti la fakton, ke la ĝenerala publiko juĝas el sia, ne el nia, perspektivo. Feliĉe mi povas fiere montri al miaj gekonatoj ne-Esperantistaj almenaŭ kelkajn nialingvajn revuojn vere allogajn. Inter ili HV okupas jam longtempe honorindan lokon. Permesu al mi tamen esprimi bedaŭron pro la iom malregula aperado. Tion oni espereble iam sukcesos eviti.
2. Ĝi tion faras bonege. Por mi, precipe pro HV, via lando jam estas ne nura nomo sur la mapo, sed nuancoplena, riĉa realaĵo. Aliflanke la revuo sukcesas konservi por sia ŝtato, kaj precipe Budapeŝto, gravan lokon en la Esperanta mondo, post la morto de Kalocsay, Tárkony kaj Baghy. Kion mi tamen neniam ŝatis pasintece, kaj oni espereble ne plu presos future – tio estas la apartaj numeroj pure hungaraj. Multe pli bone impresas la harmonia intermikso de kontribuoj el ambaŭ sferoj: naciaj kaj Esperantaj. Alian, ne tro oftan, eraron reprezentas la tro longaj, iom pezaj artikoloj pri la naciaĵoj. Povas esti iluzio, sed ŝajnas, ke superpezas la eroj priakvaj. Malgraŭe mi trovis tre interesa unu aferon el ĝuste tiu artikolaro, nome la informojn pri grandioza kanalsistemo ligonta Hungarujon kun aliaj ŝtatoj, kaj kun la maro. Kiel ĝi progresas nuntempe?
3. Mi opinias, ke jes, precipe pro la ekvilibro inter plaĉa aspekto kaj altnivela enhavo. Speciale alloga mi trovas la kombinon de Esperantismo kun la hungara etoso, ĉar la estiĝanta mondkulturo ne ŝvebas ekster aŭ eĉ super la loka, sed havas siajn radikojn en ĝi. Granda avantaĝo kompreneble estas, ke la redakcio jam posedas konsiderindan sperton kaj krome kvazaŭ staras sur la ŝultroj de homoj kiel la forpasintaj sed ankoraŭ influaj poetoj kies nomojn mi jam menciis. En HV iusence pluvivas ilia spirito.
4. Daŭrigu la belan laboron.

Ken G. Linton (Aŭstralio), Ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Aŭstralio

1. Mia ĝenerala impreso estas tre forta, kaj mia estimo tre alta.
2. HV bonege informas pri hungaraj landaj kaj literaturaj aferoj.
3. Neniu alia revuo plenumas la samajn celojn, do ne ekzistas ia komparo.
4. Estus malfacile plibonigi la enhavon, sed eble mi sugestus artikolojn, kiuj havus la celon altigi literaturan stilon ĝenerale.

Lehel Szeberényi

Szentendre – urbo de l' vidaĵoj

La vizitanto paŝanta tra la strato Greka (Görög) tuj sentas sin respektata gasto, kies vizito igis la urbon prepari, vesti kaj purigi sin. Ĉar pureco, ĉarmo, gracio akceptas lin ĉie: malnovaj domfruntoj, vestitaj en freŝaj koloroj, kaj festene mallaŭta, eĥanta zumado de homaj voĉoj. Li eble ne pensas, ke tiu preteco antaŭ la gasto jam estas konstanta, same kiel la iravena vizitado en tiu ĉi urbo. Tamen, la intimeco igas lin iluzie imagi, ke ĉio fariĝis nur por li, por tiu okazo.

Kiam li rigardas malantaŭ pordojn, malfermiĝantajn fonojn de kortoj, la belecoj kaptas la koron kaj igas gaja la animon; la ĉarmoj de modereco kaj gusto karesas lin sub la renoviĝintaj maljunaj volboj kaj „patioj", kien la moderna arkitekturo nur piedfingre enpaŝis, kvazaŭ en fono restante.

La promenanta vizitanto rimarkas tion ankaŭ en la iama „salisto-domo", fama pro la kradaj fenestroj, kiu, renoviĝinte, malfermis sian admirindan kelo-aron al ceramikaĵoj de *Margit Kovács,* simile, kiel faris la bonsensaj restarigantoj en la barokeca burĝa domo, utiligante la enfunde kaŝajn belecojn por meti tien la pentristan kolekton de *Barcsay.* La sekretajn belaĵojn de la Ĉefplaca „komercisto-domo" ne nur la scie elektitaj koloroj malkaŝas por la okuloj: ilin levas ankaŭ etoso de la interne, eĉ fenestre ekspoziciita *Bildgalerio de Szentendre.*

De tie ekvidas la vizitanto ankaŭ la denudigitan, jam skeletecan, ŝajne simplan domon de magazeno, sed eĉ laikoj rimarkas, ke la interne aperintaj maljunaj muroj flustras ion pri iamaj belaĵoj. Ili prezentos la kadrojn por la pentrista kolekto de *Kmetty.* Ankoraŭ ne diveneblas, kiel ĝi fine aspektos, sed oni jam spertis, ke tie ŝtoniĝas la revoj de inspiritaj arkitektoj, kiuj ne lasas preter orelojn la flustrojn de maljunaj muroj. Sufiĉas rigardi flanken, al la „banko-domo" kun la nova, tamen stilkonserva fasado. Ankaŭ tie la eligitaj maljunaj muroj sufloris ion al la talente inspirita arkitekto: lia verko radias artan sentemon kaj humilecon, modele akordas al la urba harmonio per nobla simpleco, homa dimensio kaj disciplino laŭ skaloj kaj proporcioj. Pro tiu domo prenas kuraĝon la vizitanto pli postuleme rigardi la novajn konstruaĵojn, ties respektindan emon por akomodi sin kaj neniel rompi la fragilan, specifan harmonion.

Kaj li daŭre plezuras kaj ĝuas, ĉar kvazaŭ printempa pluvo beligis ĉion. De la pavimo ĝis la preĝejoj ĉiu eta angulo gastame renoviĝis. En kvar preĝejoj la piaj ikonostazoj fide gardis kvar periodojn de Bizanca arto, tie ĉi, meze de Eŭropo. Estas vere agorda la rigardo al la freŝe brilaj oraj krucoj surpinte de la turoj, al la antikvece ripariteĵ tegolsuproj kaj novkoloraj morteroj: indaj ujoj de l' trezoroj. La urbo ĉion, kio prezentas spektaklon por gastoj, etendis afable al la vizitanto. Kaj li rigardis la milon da pentraĵoj, ceramikaĵoj, skulptaĵoj de ses muzeoj, kulmine la plej ekscitan, la ikonostazon de la Greka preĝejo, kiu finfine jam ekbrilas desub la nigra patino de l' tempoj, dank' al la restaŭristoj. La sepa muzeo kolektis siajn trezorojn el vasta lando, belegajn, originalajn juvelojn. Tamen la Grek-preĝeja ikonostazo en sia vera ĉirkaŭaĵo, en la mistika malhelo brilante en la trafenestra eta lumfasko: estas io alia.

Interne de la maljuna Dalmata domo la vizitanto sinkas en fotelon de malgrandeta kafejo. Kandellumo mordetas la malhelon inter la aĝaj volboj; la atmosfero estas agrable silenta, la servado mallaŭta, kaj la nomo sur la ŝildo: *Nostalgia,* unuavica inter la ĉarmaj ripozejoj, kiuj intimigas por gastoj la urbon. Jen, la posedanto ĝuinde renovigis la Dalmatan domon, je favoro de la urbo, pliigante ĝian famon. Krome, li inaŭguris aliflanke de la domo malkaran familiaran manĝejon por frandaj gustoj, kies ŝildo: ora drako... Pli da tiaj ĉarmaj gastejoj estus bonvenaj apud la ekzistantaj, kie la gasto ankaŭ serenan humoron povas ĝui apud la vinglaso aŭ kafo.

Super kapoj de la urbaj estroj la plej turmenta zorgo, kiu amasiĝas jam preme, estas la apenaŭ prokrastebla kompleta rekonstruado. Ne malmulte estis jam plenumita, tamen, tamen... ankoraŭ tre ne sufiĉe. Mono, mono bezonatas kaj loĝejoj por evakuon ebligi dum la rekonstruo, kion fakscie fari, necesas denove plia mono. Ĉion ĉi malkapablas unu urbo, ĝi devas insiste peti la landon, ĉiun, ja temas pri nacia trezoro. Jam multe helpis, subtenis la departemento, mem la lando. Tamen ankoraŭ nur iomete, fragmente okazis restarigoj – kvankam grandioze! Feliĉe videblas agemo ankaŭ inter la loĝantoj, kiel ni vidis ĉe *Nostalgia,* kaj espereble tiu agemo ade kreskos, ĉar – krom malŝarĝi iomete

Parto el la vilaĝo-muzeo de Szentendre

Jenő Barcsay, profesoro, pentroartisto antaŭ la statuo de la fama artisto-amiko Béla Czóbel

la buĝeton – tiel pliiĝas la ŝanco, ke la vivo ne migru for el inter la muzeaj muroj, kie la silenton – tio jam minacas – rompas nur ŝuklakadoj de la balzamodoran pasintecon sopirantaj fremduloj.

Vere multon faris jam tiu urbo por reakiri sian iaman brilon, sen forgesi ankaŭ pri bezonoj de la loĝantaro. Ege grava, decida paŝo estis konstrui la internan bulvardon dum la sepdekaj jaroj: epokfara por la urbo, ĉar tiel estis savebla la historia urbo. Tiel, ankaŭ per aliaj disponoj, estis forigita – eĉ de la Danuba bordo – la jam katastrofa aŭtotrafiko, kiu ne nur igis neĝuebla la urborigardon, la promenadon, sed kirlis polvon, koton, fulgon, fendetis orelojn kaj murojn, akcelante la ruiniĝon.

Nun tio jam apartenas al la pasinto. La interna bulvardo kondukanta for la tranzit-trafikon, prezentanta vastajn parkejojn por la vizitantoj, kvazaŭ urbomuro defendas nun la silenton, trankvilon, purecon, la serenan belecon, ververe la daŭran ekziston de la historia urbo.

Tamen la vizitanto meditas ne nur pri tiaspeca moderna transformado de la urba strukturo. Malantaŭ tio li vidas la esencan celon, por kiu ĝi okazis: ĉar same epokfara entrepreno estas la *nova rolo*, kiu bazas la novan renomon de la urbo – kiel la iaman renomon fundamentis la abunda komerco, la lertaj gildoj kaj la vinoj de la urbo. Kvankam tiu nova rolo ne estas sen antaŭaĵoj, tamen ne kontesteble, okazis dum nur unu jardeko, ke la urbo iĝis fokuso de la *kulturo de vidaĵoj*. Urbo, departemento, lando tiucele unuigis siajn fortojn – sukcese.

Komenciĝis ĉe la urborando – kien logis ankaŭ belega, multfaceta pejzaĝo – ke oni metis la fundamenton por grandioza, nacia entrepreno: *vilaĝmuzeo de la lando*. Konstante abundiĝas tie la vidindaĵoj de la folklora konstruado, kaj kune kun la kolektiĝantaj fakuloj mem, ĝia ekzisto jam forte efikas la spiritan vivon de la urbo. Samtiel la muzeoj, inter kiuj aparte gravas la kultura centro kaj biblioteko de departemento Pest, kiu establis sin tie ĉi, kaj kreis-donacis tiel ampleksan kulturan eblecon, ke la urbo ankoraŭ ne kapablis ĝin plene utiligi. Jam ĝia konstruaĵo reprezentas kvalitan salton, eĉ se ĝi ŝajnas modeste kunfandiĝi kun la ĉirkaŭaĵo, zorge atentante la skalon, ĉiloke tiom gravan. La kvalito precipe interne impresas rave: en la klubejo kaj teatra halo, en la invitaj librarlabirintoj, kie kvazaŭ niĉoj de kopiantaj monaĥoj donas emon kaj lokon por nuntempaj legantoj. Kaj ne lastgrade, ravas la katedrale solena vestiblo, kie feste brilas la orkoloroj de l' impona mozaiko de majstro Barcsay. Centfaca estas la tiea kultura agado, vere grandapaŝa laŭ mezuro kaj kvalito; servante la loĝantaron tamen – iom komprenebleble – la akcento glitis al la *spektaklaj artoj* (bildaj artoj, metiartoj, etnografio, teatro k.s.). Ne estus justa la rapida kondamno, ja oni cedis pro natura inspiro de la urbo: antaŭ ĉio, nestas tie la *pikturo*.

Tiel estas, ĉar multfaceta, multtendenca pentroarto trovis ĉi tie sian inspiron: ĉu la pitoreskaj pejzaĝo kaj urbo, ĉu la neordinara ĉarmo de la linioj kaj konturoj sur la montetoj, domoj, stratanguloj inspire sufloris al la artistoj, ĉu eble la ikonoj ene de la multaj preĝejoj? La majstroj, kiuj iam starigis tie siajn stablojn, edukis disĉiplojn, kaj ankaŭ ilin ĉirkaŭis novaj kaj novaj, kiel sub taŭga tegmento kolektiĝantaj hirundoj. La urbo bonvenigis tiun freŝan, buntan mondon, kiu algluis tien sian neston, baldaŭ plenigante la transdonitan eksan sanatorion kaj ties parkon. La pentristoj tamen nuntempe sukcesis pleje „ekposedi" la urbon, almenaŭ koncerne la estetikan flankon, asisti al decidoj pri kolorigadoj. Estis vere la urbo, kiu transdonis sin al ili kun certa espero pri la rekompenco, kaj samtempe surprenis egajn zorgojn de mecenato. Surloke de la kaduka sanatorio oni kreis modernan domaron por la pentristoj kaj ceteraj. En ties Galerio eblas ĉiam vidi ekscitajn ekspoziciojn. Atelieraj loĝejoj estis konstruitaj ankaŭ ĉe la romantika rivereto Bükkös. Multaj artistoj fiksiĝis tiel, kaj restis urbanoj.

La vizitanto longe plezuris tra la muzeoj, kolektoj, kiuj kreiĝis plejparte dum unu jardeko, prefere per plena renovigo de arte valoraj aĝaj domoj. Tri el la fondantaj majstroj, Barcsay, Czóbel kaj Kmetty (barĉai, cobel, kmetti) havas jam propran kolektejon, kie oni gardas ilian vivoverkon. Baldaŭ akiros similan la pentritaj heredaĵoj de Margit *Anna*, I.*Ámos*, L. *Vajda* kaj *Ilosvai Varga*. La artista familio *Ferenczy* estas vaste reprezentata en la plivastigita iama muzeo, kie iliaj artaj produktoj ricevis indan kaj konvenan lokon. Por kolekti elektitajn verkojn de la duonjarcenta pentrado en Szentendre, oni renovigis la Ĉefplacan „komercisto-domon". Malantaŭ ĝi ricevis lokon la ceramikaĵoj de Margit Kovács en la jarcentojn aĝa „salisto-domo". Por folkloraj objektoj oni transformis la plej malnovan domon de Szentendre, kie – laŭ la

tradicia diro – iam tranoktis reĝino, Maria-Tereza. Ankaŭ skulptistoj kaj ceramikistoj ricevas lokon en kaj ĉirkaŭ vitra-pavilono de la moderne transformita parko de skulptaĵoj – kaj ni ankoraŭ ne menciis kelkajn aliajn, kiel la grafikistojn, kiuj posedos domon same en la Ĉefplaco.

Al la kulturo de vidaĵoj apartenas, kvankam iom neglektata, ankaŭ la pasinto de la urbo. Vera vidindaĵo estus la Romiaj restaĵoj, precipe la *castrum,* se jam finiĝus la malkovrado. Sed tio pli kaj pli komplikiĝas, ja eĉ nun oni preskaŭ superkonstruas tiuloke novajn domojn. Tamen la urbestraro jam elektis por la relikvoj de l' pasinto la indan ejon, la historie faman domon de Ráby.

Alispecaj kulturaj vidindaĵoj estas ankaŭ volonte akceptataj en Szentendre. Unuavice kompreneble por la mil kaj milope alvenantaj gastoj, da kiuj somere eĉ dekmilo amasiĝas sur la stratoj de la urbo. Fari la urbon pli alloga por ili, abunde pliigi iliajn impresojn por senti sin ne nur bone, sed eminente – estas brava klopodo. Do instalis sin famiĝintaj spektakloj, rimarkinde viglaj kaj distre buntaj. Unue la *Teatrum,* kies ludejo estas mem la Ĉefplaco kaj ĝia belega angulo la kuliso; sekvis la iamajn foirojn aludantaj antaŭpreĝejaj ludoj, la strataj kaj Danub-bordaj amuzoj kun dancoj, muzikoj, lokaj gajaĵoj plenserie, kun petolaj praktikoj, fajro-saltoj kaj aliaj...

Certe ne ĉiuj refreŝigitaj popolkutimoj sukcesis en la iom arbitra, por ili fremda medio; sed ree iĝis populara la Serba kermeso ĉe la preĝejo Preobraĵenska, ĉar ĝi restis en sia propra, natura medio. Kelkaj someraj spektakloj estis tro fervore faritaj, foje oni forgesis pri la tie ĉi nepre atentinda skalo; eĉ la Teatrum superkreskis la Ĉefplacon, ties graciecon ĝi ombris, kvankam tiu fono ebligis mirinde naturan kulison por mezepokaj teatraĵoj.

Oni fiere menciis la sukceson de la urbo, kiu pruvis ĝian grandiozan altiron: la viziton lastjare de du milionoj da homoj. Eble tiu fiereco kaŝis ankaŭ ian malfirmecon, nuancon de timo. Ĉar la nombro estas jam prema, ĉar giganta por la urbeto. Bone, ke aperis jam tendenco al pli intimaj programoj, helpe de aliaj artoj, ne nur de la spektaklaj; muzikaj vesperoj en ĉarmaj, renovigitaj kortoj jam signas la manieron, servi la pli intimajn kunvenojn, decajn al la alloga etoso de la urbo.

Dum la fremdultrafika invado plimalpli taŭge funkciis la provizado de la gastaro, samtempe tiu de la loĝantaro. Novaj kuirejoj de grandaj kaj etaj restoracioj kunagis, sekve nun ses mil personoj povas ĉiutage manĝi en Szentendre. Sed leviĝas pluaj zorgoj por la urbo. La vizitanta homamaso tumultas preskaŭ nur sur kaj ĉirkaŭ la Ĉefplaco, pro kio la urbocentro plene ŝtopiĝas netolereble. Se oni sukcesos fari pli alloga urborande kelkajn pitoreskajn lokojn, la gastaro verŝajne pli disiĝos. Estus utiligeblaj la naturaj belecoj ĉirkaŭ la rivereto Bükkös, tamen pli zorge protektante la medion ol antaŭe okazis. Oni deziras altiri la gastojn al la Dalmat-karaktera kvartalo *Szamárhegy* (monteto Azeno), kiun zigzage subfosas labirinto de keloj. Jen 160 km longa aro de kelokoridoroj, parte jam minacata pro enfalo, kion urĝe malhelpi la urbo strebas per laboro de ŝtataj ekspertoj. En kelkaj firmigitaj keloj eblos krei gajaspektan-ĉarman trinkejon.

La insulo *Pap* fariĝis jam grava centro de la fremdultrafiko. Restarigi la insulon laŭ sia iama romantika beleco, estas dorlotata ideo de la urbo. Ankaŭ la najbara nova ŝipstacio akiros pli fortan kontakton kun la enurba trafiko. Aleo kondukos baldaŭ sur la Danub-bordo en la centron. Kaj konstruiĝas du moteloj, servi ankaŭ al la akvosportejo kaj kampadejo, tre favore por la en- kaj eksterlandaj Danubaj boatturistoj.

Tiu gastocentra urbo kompreneble havas ankaŭ siajn loĝantojn, eĉ se tiu ĉi artikolo iom neglektis ilin. Gravas, ke la urbo ne forgesu pri ili, ja tion eĉ la fremduloj povus rimarki. Ankaŭ tiurilate la urbo devas ne honti: multaj publikaj investaĵoj kaj establoj – eĉ se parte orientitaj laŭ la gastaro – agrable efikas la vivon de la loĝantaro (trafiko, kanalizado, akvoprovizo, purigiloj k.a.). Krom tiuj konstante kreiĝas ankaŭ tiaj establoj, kiuj servas sole aŭ plejparte la bezonojn de la loĝantaro.

Konstruiĝis modernaj loĝkvartaloj, zorge atentante la harmonion de la urba panoramo, eĉ per la domaj suproj konforme al ritmo de la geografia ĉirkaŭo, kaj determinante la lokigon strikte laŭ la idealaj proporcioj de la urbo. Du trionojn de tiuj loĝejoj akiris manlaboristoj, ja, eble surprize, temas pri urbo de plejparte laboristoj (4 mil el la entute laborkapablaj 6 mil homoj). Ili igis famaj la betontubojn produktantan fabrikon, la fabrikon de skribiloj, grandparte eksportataj, kaj la paperfabrikon, „regantan" la koverto-produkton en la lando ktp. Tio povas klarigi la ege rapidan kreskon de la urba loĝantaro, kiu dum kelkaj jaroj saltis de 14 al 17 miloj; antaŭe loĝis nur ĉ. 10 miloj. La granda altirforto produktis tion, ne la natura plimultiĝo.

Pro tiu granda zorgo oni devas meti la limon ĉirkaŭ la 20 miloj, se oni ne volas lasi disrompi la idealajn kadrojn de la urbeto. Jam nun, semajnfine la nombron pliigas 30 miloj da vizitantoj, loĝantoj de feriaj domoj, kiuj eĉ dumsemajne nombras almenaŭ 6 milojn. Tian kreskon sekvi per infrastrukturo – faras kapturnan zorgon al la urbo. Sed alia elirvojo ne ekzistas, do ĝi devas sekvi tion brave: ĝi konstruigas stratojn, lernejojn, sanitarajn establojn, vartejojn kaj antaŭlernejojn, ankaŭ pro la lingvoj de naciaj minoritatoj; vendejojn, merkatojn, ampleksigas la provizadon de akvo, tergaso, kanalizado, elektro; parkojn, ludplacojn kreas helpe de la publiko, modernigas la servojn, la trafikilojn, aparte por la laborantoj en la ĉefurbo... Listigi la multspecajn, egajn fortostreĉojn maleblas ĉiloke, ĉiujn agojnfarojn, kiuj celas, ke la urbanoj sentu profunde la urbon *la hejmo* de sia vivo.

Koncizige tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Ĉu vi konas la piedsignojn de l'Profeto?

UNUA AKTO

Unua bildo
(Fragmento)

Sablo kaj ĉielo kaj sunbrilo.
Multaj parolas samtempe, kelkfoje kompreneblas frazeroj: „Stultaĵo, neniam mi aŭdis pri triopumado! " „Mi ne komprenas, kio estis tiu bojado! " „Tamen estas bone, ke ni veturas antaŭen, kaj progresas malantaŭen! " „Ni ne veturas antaŭen, sed fakte cirkulas, kaj dume la sorto portas nin malantaŭen! " „Eraro, la sorto de la homo ne estas aŭtobuso! " „Kiu havas maĉgumon? " „Ĉu nia sorto estas maĉgumo? " „Estas stultaĵo produkti veturilojn sen bremso kaj stirilo. Per konvena planado eblus anticipe elimini tion! " „Hu, kiel varmege, kiam ni fine alvenos? " „Mi esperas, ke malantaŭ iu sablomonteto baldaŭ aperos oazo kun luksaj kabanoj kaj naĝejo." „Certe ne tuj: ĝis la horizonto ĉion kovras sablo! " „Aŭ abismo kun tabuleto, ke tie ĉi estas la mondofino! " Rido. Malgranda aŭtobuso alvenas kun remorko, bremsas, haltas. Voĉoj el la aŭtobuso.

– Kio okazis? Kial ni haltis?
– Certe paneo.
– Kion vi diras?
– Unu el la gumoj difektiĝis.
– Nur tio al ni mankis!
– Laŭ mi, ni perdis la vojon.
– Kial vi pensas tion?
– Rigardu: nenie vojo, nur sablo ĉie.
– Ni faru signalfajron!
– Ĉu per sablo? Dum hela tago?
– Elĉerpiĝis benzino, pro tio ni haltis!
– Ĉu iu kunhavas iom da benzino?
– Se almenaŭ ni paneus ĉe trinkejo...

IDEL – (*Lia voĉo*) Gesinjoroj! En la nomo de la Turisma Oficejo SED NI SAME mi salutas vin en nia ekskurso. Nun bonvolu eliri!

Silento. Malfermiĝas la pordo de la aŭtobuso, la pasaĝeroj vice eliras.

JEVA – Kiel interese: granda nenio! Ĝis la horizonto: granda nenio! Kio interesa estos ĉi tie? Tomi! Kie vi estas, Tomi?

TOMI – Vi vidos poste, panjo! Ĉe via jupo, panjo.

JEVA – Kion mi vidos? Pri kio vi parolas?

TOMI – Pri tio, kio estos interesa ĉi tie. Se vi ne rimarkis, mi respondis vice viajn demandojn, panjo!

JEVA – Kial vice?

TOMI – Por ke vi ne miksu la respondojn!

ERNESTRO – (*Eliras el la aŭtobuso, stumblas, falas, entuziasme leviĝas*) Fine mi estas ĉi tie! Rapide ni organizu ĉion! ... Sed kie estas la indiĝenoj? Mi postulas indiĝenojn!

MOVA – Fine ni povas ripozi iom! Estas terura tiu konstanta kuregado! Kie mi povus kuŝiĝi por duona tago? (*Sternas sin sur la sablo*) Ĉi tie!

KRISTINA – (*Eliras frotante la okulojn, rimarkinte la aliajn ŝi paŝas al ili*) Mi estas turisto. Homo, kiu venis de malproksime, sed nun havas la hejmon ĉi tie. Kaj dum mi estos ĉi tie, mi volus vivi, kiel vi, manĝi kaj trinki tion, kion vi, vidi bela kaj admiri tion, kion vi. Mi volus fariĝi via amikino kaj fratino, rakonti al vi pri fora lando, el kiu mi venis, kaj mi volus aŭskulti viajn ĝojojn kaj malĝojojn... Nur mi ne scias, kiel ni povus kompreni unu la alian, ja ni parolas malsamajn lingvojn...

ERNESTRO – Ne gravas, sinjorino, ni estas nur viaj kunvojaĝantoj, la indiĝenoj sekvos poste!

KRISTINA – Ĉu ankaŭ vin allogas ĉefe la homoj?

JEVA – Ho, jes! Ĉie ili prezentas ion novan! Ion alian! Ĉie ion originalan! Ofte nekompreneblajn, altirajn aferojn!

KRISTINA – Ho, jes, estas multo nekomprenebla sur la Tero, sed nenio ja ol la homo pli mirindas!

ERNESTRO – Bussiness is bussiness! Mi povas imagi, kiel mirindajn umaĵojn la lokaj loĝantoj vendas ĉi tie por groŝoj? Sed kie ili malfruas? (*Ekpromenas, rigardas al la malproksimo*)

INA – (*Eliras el la aŭtobuso*) Laŭ miaj spertoj el Suda Nenilando, ni povas lasi nian haŭton al tiaj sunradioj nur iom post iom. (*Strecas la ombrelon*) Ĉe kiu longitudo ni estas... kaj ja, kiel nomiĝas tiu junulo... nia ĉiĉerono?

ADAMO – (*Malantaŭ ŝi eliras el la veturilo*) Idel, sinjorino! Tio signifas „kredu al mi! ", almenaŭ tion iu asertis dumvoje. Sincere dirante, antaŭ tiu klarigo mi havis tute alian supozon.

INA – Ĉu?

ADAMO – Konante el libroj la filozofiemon de la loka popolo, mi supozis, ke nia amiko reklamas per sia nomo la kombiniĝon de vivplezuro kun nacia devo: idon el ĉiu virino!

INA – Vindu vian kapon per malseka viŝtuko, alie vin trafos apopleksio!

ADAMO – La lokanoj trovas plezuron kaj belon en la kontentigo de ĉiuj homaj bezonoj, kiuj ĉe ni jam tute komerciĝis! Nian tagmezan sandviĉon ni enstomakigas sidante en aŭtomobilo, inter du komercaj intertraktoj; ili ĝuas la manĝadon laŭ reguloj de plurjarcentaj ritoj dum horoj, ĝuante tiun agadon mem, rekonante kaj aprecante la nuancajn diferencojn!

INA – Mi jam aŭdis pri tio.

ADAMO – La riĉego de ilia ama vivo egalas kvin Kamasutrojn! Por ni ĉio tio jam povas ŝajni perverseco!

INA – Jes, mi finfaris ĉion tion.

ADAMO – Ĉu nur nun vi diras tion, sinjorino? !

INA – Nun mi ekmemoras, ke iu el miaj edzoj devenis de ĉi tie: li ardis, fajreris – kiel tiu ĉi sablo...

MOVA – (*Al Adamo*) Li ĉiam kvazaŭ gluiĝas al mi! Sed mi deklaris al li, ke dum la ferioj li ne atendu priservadon, estos neniaj „mi-petaskara", „bonvolu-karulino"! Vidu, kiel li mallertumas ankaŭ nun! (*Helpas al Jan eliri el la aŭtobuso*)

JAN – (*Elrampante el la aŭtobuso oblikve ĉirkaŭrigardas*) Kio estas tio? Granda nenio! Demandu, kiam ni veturos plu?

MOVA – (*Krude*) Neniam! Ni ripozos! (*Gapas la ĉielon*)

ADAMO – (*Ankaŭ li gapas la ĉielon*) Kiel bele blua estas la ĉielo! Tio jam estas io!

ROBERTO – (*Plurfoje trairinte la terenon, al la ĉiĉerono, kiu ĝuste eliras el la aŭtobuso*) Estas interese, kiel proprecan malkompleksecon vi sukcesis krei ĉi tie: nek hotelo, nek restoracio, nek aliaj suplementaj instalaĵoj, eĉ ŝoseo ne kondukas ĉi tien. Mi scivolas, kiel vi sukcesis malaperigi la altirforton? Genie! En perfekta malkompleksecon ne estas loko por altirforto, kaj mem la dezerto tute ne havas tion... ĝi havas verdire forpuŝforton, jes, forpuŝforton! Sincerajn gratulojn! Natura forpuŝforto plus absoluta manko de ĉia komforto kaj de turisma akceptobazo egalas la perfektan turisman malkompleksecon. Mi

Esperanto–Teatroj en Budapeŝto

ankoraŭ ne vidis ion similan! Nenia bezono de investado, ideoamortizo fariĝanta senperde profito, eĉ kiel funkciigaj kostoj aperas nur via salajro, kaj la salajro de la ŝoforo, ja certigi veturilon ankaŭ estis nia tasko, kaj jes ja, la kostoj de propagando! Tiujn eĉ vi ne sukcesis ŝpari! (*Prenas flugfolion, eklegas ĝin*) „Ĉu vi ne volas rezigni pri via kutima komforto? Ĝiru 250 dolarojn al la konto numero 38535 de la Kreditbanko de Zürich kaj pasigu hejme viajn feriojn! " Sur la alia flanko alia oferto: „Kaj se tamen, do ni atendas vin al niaj 500-dolaraj ekskursoj pas de tout compris (not at all included, tio estas, nenion inkluzivantaj!) Necesas minimume ok personoj kaj propra aŭtomobilo! Hezitu, sed neniel elektu el tiuj du ebloj ambaŭ: cetere faru, kion vi volas! · SED NI SAME" ... Tio evidente estas ankaŭ la nomo de la Turisma Oficejo! ... Geniege, sinjoro, pri io simila eĉ la fakliteraturo ne raportis, sed ĉu mi ne tedas vin?

IDEL – (*Parolas ridetante, kun fremdeca prononco*) Pardonu min, estimata sinjoro, sed mi tute ne komprenas tion, kion vi diras. Mi nur parolas vian lingvon, sed ne komprenas ĝin. La tekston, necesan por mia ofico, mi enkapigis laŭ temoj per magnetofono. Krome mi scias ankaŭ kelkajn belajn popolkantojn kaj poemojn, kiujn vice mi prezentos al vi, por gajni vian simpation.

INA – (*Alpaŝas ilin*) Diru, sinjoro Ido, ĉe kiu longitudo ni estas?

IDEL – Kara sinjorino, bedaŭrinde mi ne scias respondi, ĉar mi nur parolas vian lingvon. Gravas ne tio, ke mi komprenu vin, sed tio, ke vi komprenu min, ja estas vi, kiuj venis al ni, kaj ne inverse. Ĝuste pro tio, dum la disponebla mallonga tempo mi ellernis nur paroli vian belan lingvon. Estimata sinjorino, akceptu mian plej sinceran respekton!

El la hungara: V. *Benczik*

Post la Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj en Gdansk (1978) sekvis iom tro longa paŭzo en la teatra aktivado. Sed post tiu paŭzo esperantistaj teatraj trupoj havos eĉ du sinsekvajn eblojn prezenti sian arton: fine de novembro 1981 en Pula, kaj inter 19–28 de marto 1982 en Budapeŝto, en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo.

La Landa Turisma Oficejo aranĝis la Budapeŝtan Printempan Festivalon unuafoje dum 1981. Ĝi celis krei tipe *kulturan* turisman aranĝon, kiun dominas ĉefe teatraj kaj muzikaj programoj. Venis kvazaŭ nature la ideo, ke la Printempa Festivalo de 1982 inkluzivu ankaŭ Esperantajn programerojn, ja la Internacia Lingvo havas aparte grandajn eblojn kaj funkciojn sur la kampo de la kultura turismo.

Kiam tiu ĉi artikolo estas verkata, la programo de la Esperantaj teatraj vesperoj ne estas ankoraŭ tute fiksita, sed jam certas, ke okazos *minimume dek prezentadoj,* t.e. ĉiuvespere dum la daŭro de la Printempa Festivalo.

Hungaroj mem preparas du teatraĵojn, ambaŭ daŭros po ĉ. 100 minutojn. Ambaŭ teatraĵojn prezentos profesiaj aktoroj de la hungara ĉefurbo; kelkaj el ili havas vastan tutlandan renomon. En la bone konata verko de la soveta B. *Vasiljev:* „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj" ludos praktike la samaj geaktoroj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj furore sukcesigis tiun ĉi emocian verkon antaŭ la hungara publiko. La alia teatraĵo, „Ĉu vi konas la piedsignon de l' Profeto? " de János *Elem* havos sian premieron en Esperanto, kaj pro sia karakteriza turisma temo ĝi antaŭvidas gravan sukceson ĉe la esperantista publiko. Hungara Esperanto-Asocio eldonos tiun ĉi verkon ankaŭ libroforme: specimene aperas el ĝi fragmento en tiu ĉi numero de nia revuo.

Kompreneble, venos al Budapeŝto ankaŭ eksterlandaj trupoj. Depende de la pluaj intertraktoj, prezentos sian arton Pola Esperanto-Teatro, Jadwiga Gibczynska, Leningrada Esperanto-Teatro, La Krizalido (el Francio) kaj iu el la pluraj bulgaraj trupoj. Pri la detala programo aperos aparta kajero fine de la jaro, sed informos pri ĝi *Budapeŝta Informilo,* kaj ankaŭ la sekva numero de HV. Samloke aperos informoj ankaŭ pri la kondiĉoj de partopreno por spektantoj. Interesiĝantoj jam post la apero de tiu ĉi numero skribu al la *Turisma Komisiono de HEA, Budapest, Pf. 193, H–1368,* kiu sendos informajn materialojn al la petintoj.

Estas notinde, ke ankaŭ esperantistaj partoprenontoj havos eblon ĝui la tre riĉan ceteran programon de la Festivalo (verkojn de Bartók, Kodály, Stravinski), folklorajn dancesemblojn, tre interesajn belartajn ekspoziciojn ktp. Dum la Festivalo denove okazos la granda ekspozicio: „Vojaĝo '82": pri la simila ĉi-jara aranĝo nia revuo informis en la numero 2/81. Tiu ĉi ekspozicio denove vaste propagandos pri Esperanto, kiel pri ilo de la internacia turismo.

La Tria Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj okazos do en kadro de prestiĝa kultur-turisma aranĝo, je financa kaj morala risko de grava hungara ŝtata instanco. Ni esperas, ke esperantistoj scios taksi tiun ŝancon, kaj multaj trovos eblon viziti la hungaran ĉefurbon fine de marto.

V. Benczik

HUNGARAJ PROJEKTOJ EN LA PROGRAMARO DE TESCO

Scienca-teknika kunlaborado, delegado de ekspertoj, konsulta servo

TESCO nuntempe realigas 49 interŝtatajn priteknikajn kontraktojn de Hungario. Duflankaj laborprogramoj regulas la kunlaboradon kun kelkaj evoluantaj landoj kaj determinas la delegadon de hungaraj ekspertoj al tiuj landoj.

15 laborprogramoj estis asignitaj far TESCO en la jaro 1978, inter aliaj tiuj kun Algerio, Libio, Meksikio, Jamaiko kaj kun kelkaj landoj de Mez-Oriento.

La kompanio aŭspicias kelkajn oficejojn okupiĝantaj pri la lokaj teknikaj kaj sciencaj problemoj de la koncernaj landoj kaj prizorgas pri delegado de hungaraj specialistoj al tiuj landoj.

Filioj de TESCO funkcias en Algerio, Nigerio kaj Irako. Ĝis la fino de la jaro 1978 TESCO peris la konsultan agadon de 800 hungaraj ekspertoj en la evoluantaj landoj. Tiu ĉi nombro altiĝis je 900 en la jaro 1979. Samtempe en 1978 TESCO prizorgis pri instruado en Hungario de 1500 fremdlandaj studentoj kaj fakuloj.

En 1979 plejparto de la hungaraj ekspertoj laboris en Algerio, Irako, Nigerio kaj Libio. Kvinono de la ekspertaro laboris kiel kuracistoj aŭ sanitaraj laboruloj, 10 procentoj agadis kiel agrokulturaj specialistoj, 15 procentoj sur tereno de geologio kaj minotekniko, 20 procentoj okupiĝis pri konstruado de industriaj objektoj kaj 15 procentoj estis ekspertoj pri akvoprizorgado. Kelkaj hungaraj fakuloj agadis sur tereno de instruado en altlernejoj kaj universitatoj.

TESCO ankaŭ nuntempe delegas hungarajn ekspertojn kaj al okcidentaj kaj al evoluantaj landoj por kontrakti pri projektado de industriaj objektaroj kaj pri ekfunkciigo de diversaj teknikaj aparataroj.

Triono de la interrilatoj kun evoluintaj kapitalismaj landoj realiĝis en formo de kunlaborado por tria merkato. Sur kampo de teknologiaj prizorgadoj de ekfunkciontaj uzinoj TESCO kunlaboris unuavice kun firmaoj BABCOCK, GEA, RHEINHOLD kaj MAHLA, SIGENER AG ktp. Krome variaj projektaj laboroj kaj priteknologiaj kunlaboroj realiĝis en Algerio kun kompanioj FAMATEX kaj KIRCHFELD. Pasintjare TESCO kunlaboris en Libio kun firmaoj APEG kaj BABCOCK. La hungara kompanio kunlaboris pri muntado de ŝtalaj konstrueroj kaj pri elektrolizo de uzinoj de VÖEST ALPINE, WIENER BRUCKENBAU, BBC, ELIN UNION en Aŭstrio. La aŭstria firmao SIMMERING GRAZ PAUKER konstruis centralon en Tunizio kunlabore kun TESCO. Kiel subkontraktanto de tiu kompanio TESCO prizorgis pri rekonstruadaj laboroj de bierfarejo en Irako. Ĉi-tempe oni pritraktas kun italaj kaj svisaj kompanioj pri projektaj kaj ekfunkciigaj kunlaboroj realigontaj en triaj landoj.

En la jaro 1978 la plej granda interkomencado de TESCO en kategorio de evoluantaj landoj okazis en Algerio. La ĉefa kontrakto konsistis el 60 diversaj subkontraktoj. Pli ol 100 konstruinĝenieroj helpis la laboron de la konsulta oficejo de TESCO. La hungaraj ekspertoj laboris unuavice kiel projektistoj de publikaj konstruaĵoj, ŝoseoj kaj fervojoj.

Kelkaj grupoj de specialistoj laboris pri akvoprizorgadaj projektoj por Algerio. La valoro de kontraktoj de TESCO por tiu nordafrika lando dum du jaroj (1977-1979) altiĝis je 80 procentoj.

TESCO agadas en Libio ekde 1975 kaj tiu lando havas prioritaton en la merkato de la hungara kompanio. Oni kontraktis pri projektado de fervojlinio Sfax-Tripoli inter Libio kaj Tunizio. Krome – en 1978 – TESCO kontraktis kun la ministerio pri akvoaferoj de Libio pri projektado kaj teknika inspektado de akvoscienca esplora laboratorio kaj tiu de mezlernejo. La kosto de la TESCO-laboro atingis 1,5 milionojn de usonaj dolaroj. Krome kreiĝis favoraj cirkonstancoj por la hungara projektista agado sur terenoj de medicino, agrokulturo, transportado kaj akvoprizorgado.

Inter la evoluantaj landoj ankaŭ Nigerio havas prioritatan agadterenon por TESCO, ja ekz. en la jaro 1978 pli ol duobliĝis la valoro de la ĉi-rilataj kontraktoj. TESCO kunlabore kun KÖZTI (Hungario) agadas tie pere de ilia komuna inĝeniera konsultejo, funkcianta en Kano, en la norda parto de Nigerio. La hungaraj specialistoj projektas arkitekturajn kaj akvoprizorgadajn objektojn, krome okupiĝas pri planado de rekonstruado de urboj. En la lastaj jaroj TESCO partoprenis en kelkaj kartografiaj laboroj pri tiu tereno. Kunlabore kun okcidentaj kompanioj ankaŭ hungaraj fakuloj partoprenis en la muntado kaj ekfunkciigo de kelkaj oleo-kondukilaroj. Laŭ la ĉi-rilataj kalkuloj, la kompanio TESCO akiris ĉi-lande 30-procentan altigon de kontrakto-valoroj.

TESCO havas partnerojn ankaŭ en Suda Jemeno. Ĵus estis asignata kontrakto pri projektado de farmobienaj konstruaĵoj en la irigaciita agrokultura tereno de Wadi Meif'ah. Hungaroj projektas ankaŭ konstruaĵojn de unu 1700-hektara plantprodukta agrokultura entrepreno. Hungaraj projektistoj partoprenas ankaŭ aliajn laborojn, koncernantaj agrokulturon. Oni jam priesploris ĉi-tiun terenon kaj la ĉi-rilataj dokumentoj estas kompilitaj.

La hungara projektista laboro startis en Kuvaito en la jaro 1978. TESCO planas pliampleksigi ĉi tiun kontakton ankaŭ ĉi-jare.

TESCO ORGANIZO pri INTERNACIA TEKNIKA kaj SCIENCA KUNLABORO
Hungario/Budapeŝto
H-1054 Budapest, Rosenberg hp. u.21.
Koresponda adreso: H-1367 P.O.B. 5/101
Telekso: 22-4642 Telefono: 110-850
Telegramo: TESCO-Budapest

Infana Esperanto-Teatro „D-ro Zamenhof"

En la jaro 1978 ĉe la Drama Teatro „Adriana Budevska" en urbo Burgas estis fondita infana teatra studio, kun artgvidanto Dimitr Elenov. Jam en la komenco la junaj talentoj konvinke pruvis siajn kapablojn. Post la unuaj sukcesoj antaŭ bulgara publiko venis ankaŭ la ideo krei infanan Esperanto-Teatron – la unuan en la mondo!

Laŭ iniciato de Bulgara Esperanto-Asocio kaj la Distrikta Junpionira Domo en Burgas, dum la printempo de 1979, la infanoj de la teatra studio ĉe la Drama Teatro „Adriana Budevska" metis la fundamentojn de la Infana Esperanto-Teatro.

En la komenco estis diversaj problemoj – kune kun la alproprigo de sceneja majstreco oni devis ellerni kaj malkovri la riĉecon de la lingvo Esperanto. Oni devis prepari ankaŭ konvenan repertuaron.

Komenciĝis la provoj de la unua teatraĵo en Esperanto: „Fabeloj por grandaj kaj malgrandaj infanoj" de Andersen. La dramaturgia materialo estis ellaborita de la geaktoroj Vencislav Kisjov kaj Kalinka Popova, laŭ kvar verkoj de Andersen; la Esperanta traduko estas de M. Elenov; la versaĵoj estis tradukitaj de la bulgara Esperanto-poeto Simeon Simeonov; la surscenigo estas de Dimitr Elenov; la scenografio – de Gero Janakiev.

La problemoj, kiujn la teatraĵo „Fabelo por grandaj kaj malgrandaj infanoj" starigas kaj solvas, estas antaŭ ĉio moralaj. La Kamenpurigisto kaj la Paŝtistino – fundamenta personaro en la dramaturgia materialo, devas trapasi multajn malagrablaĵojn kaj danĝerojn, ĝis atingi la venkon de la Bono. La ago sceneja estas dinamika, ĝi permesas malkovri la taŭgan kaj sukcesan reenkorpiĝon de la junaj talentoj: 36 roloj de la teatraĵo estas plenumitaj de 18 infanoj. Inter la junaj geaktoroj elstaras Deljana Ĥaĝijankova, Svetlana Todorova, Zlatko Gulekov, Radostina Vrangova, Rosica Slavova, Rozita Miĥajlova, Violeta Raĉeva k.a.

La unua prezento de la teatraĵo „Fabeloj por grandaj kaj malgrandaj infanoj" okazis en Burgas, en la fino de septembro 1979. La honora prezidanto de BEA Nikola Aleksiev, kiel baptopatro, donis la nomon de la teatro: Infana Esperanto-Teatro „D-ro Zamenhof". La junaj esperantistoj, adorantoj de la teatro-arto, en decembro de la sama jaro partoprenis la celebron de 120-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof per sia unua prezento, la 15-an de decembro, en Sofio. En julio de 1980, dum la kvardeka jubilea nacia kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Plovdiv, estis la tria prezento de la Infana Esperanto-Teatro. Laŭ invito de la Departementa Esperanto-Komitato de Budapest, en julio 1981 IET donis sian kvinan prezenton en Dunakeszi – Hungario.

La strebo de la Infana Esperanto-Teatro „D-ro Zamenhof" estas pliriĉigi senĉese sian repertuaron. Post „Fabeloj por grandaj kaj malgrandaj infanoj" oni pretigas novan spektaklon – la teatraĵon „Ĉu vi estas la loĝantoj de la Tero?" de Vasil Stanilov. Efektive tiu teatraĵo jam estis prezentita pasintjare de Dimitr Elenov, sur bulgara scenejo. Antaŭstaras ĝia prezento esperantlingve. La surscenigo estas ankaŭ de Dimitr Elenov; la traduko – de M. Elenov kaj Mariana Elenova. La scenejaj solvoj estas de Nikola Stanĉev; la muziko de Ivan Kolarov.

La nova teatraĵo „Ĉu vi estas la loĝantoj de la Tero?" traktas interesajn problemojn per la helpo de scienca fantazio: post supozita tutmonda katastrofo formiĝas nova socio – izolita en la subakva mondo. La problemo havas du solvojn: homoj postvivintaj la katastrofon devas aŭ perei, aŭ daŭrigi sian ekzistadon inter la novaj kondiĉoj. La fina konkludo estas kategoria: ĉiupreze, adaptante sin al la novaj kondiĉoj de vivo, la homaro devas vivi. Tiu optimisma konkludo igas la spektanton pensadi pri la dimensioj kaj pri la senco de la homa vivo.

En sia estonta laboro la IET daŭrigos kaj pliriĉigos la jam ekzistantan tradicion. La novaj teatraĵoj de la estonta repertuaro konfirmos la artajn atingaĵojn de la junaj talentoj, kaj per la scenejo ili denove malkovros ankaŭ la leksikan kaj tonnuancan riĉecon de Esperanto.

Georgi *Rajkov* – Mariana *Elenova*

K. Kalocsay **aperis** K. Kalocsay

TUTMONDA SONORO

Poezia antologio en Esperanto tradukita el 30 lingvoj

de

K. Kalocsay

TUTMONDA SONORO

Poezia antologio en Esperanto tradukita el 30 lingvoj

581 poemoj tradukitaj el 30 lingvoj de la subaj 185 poetoj:

Faraono Ahn-Aton, Reĝo Salomono, Solon, Mimnermos, Sapfo, Alkajos, Theognis, Ibykos, Anakreon, Simonides, Ajskylos, Bakhylides, Sofokles, Eŭripides, Aristofanes, Asklepiades, Kallimakhos, Leonidas, Anyte, Theokritos, Bion, Timon, Antipatros Sidonios, Meleagros, Filippos, Lukillios, Ammianos, Lukianos, Rufinos, Palladas, Paulos Silentarios, Damaskios Filosofos, Diofanes Myrinajos, Julianos Ajgiptios, Parmenion, Theodorides, Gnaeus Naevius, Quintus Ennius, Plautus, Publius Syrus, Lucretius, Catullus, Vergilius, Horatius, Tibullus, Sulpicia, Propertius, Ovidius, Lucanus, Petronius Arbiter, Martialis, Juvenalis, Statius, Ausonius, Ambrosius, Prudentius, Claudius Claudianus, Namatianus, Apollinaris Sidonius, Anicius Boëthius, Venantius Fortunatus, Kalidasa, Lao-Ce, Kong-Fu-Ce, Meng-Ce, Mo Ti, Li Taj-Po, Takahaŝi no Muŝimaro, Hitomaro, Akahito, Okura, Tahito, Jakamoĉi, Hoĵiuara no Hirocugu, Princino Nukata, Ĉurajuki, Micune, Tomonori, Kibino, Narihira, Imperiestrino Niĵoo, Baŝoo, Kjorai, Moritake, Kakei, Ĵoošoo, Kikaku, Abu Ali Ibn Sina, Ĝelaleddin Rumi, Sordello, Walter von der Vogelweide, Sankta Francisko de Assisi, Cino da Pistoia, Angiolieri, Dante, Petrarca, Chaucer, Rutebeuf, Villon, Sankta Teresa de Avila, Camões, Lorenzo de Medici, Angelo Poliziano, Raffaello Sanzio, Ronsard, Du Bellay, Argensola, Góngora, Lope de Vega, Spenser, Shakespeare, Milton, Janus Pannonius, Balassi, Corneille, Chénier, Arnault, Lamartine, Victor Hugo, Goethe, Schiller, Heine, Platen-Hallermünde, Lenau, Leopardi, Carducci, Lorenzo Stecchetti, Edmondo de Amicis, Shelley, John Keats, Puŝkin, Lermontov, Csokonai, Vörösmarty, Petőfi, Arany, Poe, Tennyson, Browning, Gautier, Musset, Nerval, Leconte de Lisle, Hérédia, Baudelaire, Verlaine, Rimbaud, Bécquer, Alecsandri, Eminescu, Coşbuc, Mickiewicz, Vrchlický, Vazov, Mihajlovski, Veličkov, Čilingirov, Rakitin, Trajanov, Kovačev, Rabindranath Tagore, Verhaeren, Strindberg, Vajda, Ady, Gorter, Holst, Marie Under, Johannes Semper, Jovan Dučić, Pascoli, D'Annunzio, Pastonchi, Ada Negri, Chiesa, Zoppi, Abbondio, Babits, Majakovskij, Attila József, Radnóti, Gyula Illyés, Sándor Rákos, Luu Trong Lu, Te Hanh, krome fragmentoj el Gilgameŝ, Biblio, Greka Antoligo, Ŝi King, Manjoošuu, Kokinŝuu kaj Kanteletar

Du tole binditaj volumoj de formato A/5, 672 p. Prezo: 66,–ned. gld. ISBN (por la tuta verko): 963 571 077 1. Oni mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe sia kutima libroservo. Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj Bulgario turnu sin al sia Landa Asocio, en Jugoslavio al la E-Ligo de Bosnio-Hercegovino, en Sovetio al la internacia librovendejo «Druĵba» en Moskvo, en GDR al la librovendejo de la Hungara Kulturcentro en Berlino.

aperis aperis aperis aperis aperis aperis aperis aperis aperis aperis aperis

Károly Szakonyi
(1931–)

Ĉiuj rapidas hejmen

Ni ĝuste volis fermi la ejon, de tagmezo maloftis gastoj, nenifare mi staradis ĉe la pordo, rigardante la straton tra la kurteno, la bushaltejon; tiel, malantaŭ la diafana, blanka tolo ŝajnis, kvazaŭ neĝus ekstere, kvankam de tagoj estis malhele kaj aĉe griza vetero. El direkto de la rivero ŝvebis nebulo. Neniu elbusiĝinto venis en la trinkejon, kiel kutime, por bierumadi aŭ kafumi, ili nun trapasis la straton direkte al la loĝdomoj, portante pakaĵojn envolvitajn en magazenaj paperaĉoj. Kelkaj el ili, subbrake kun la Kristnaska abio. Miskreskaj abioj, tiaj, kiaj kutime aĉeteblas en la lasta tago. Mi jam antaŭ du semajnoj aĉetis la abion en vendoplaco, ĝi pendis en la malvarmo sub la fenestro de nia loĝejo, en la kvara etaĝo, nur hodiaŭ matene mi entiris ĝin por ke la edzino povu ĝin beligi per ornamaĵoj. Oni devas antaŭzorgi pri ĉio. Mi jam scias. Mi travivis iom da jaroj, kaj la vivo alkutimigis min akiri ĝustatempe ĉion, kion mi bezonas. Abrupti, malcertadi mi ne ŝatas, temu pri ia ajn bagatelaĵo. Eĉ la kolorajn elektrajn bulbetojn mi jam zorge elprenis el la skatolo zorge fermita lastjare. Nokte vizitos nin la gefiloj, kun la du nepetoj. Mi aĉetis ĉion, ludkubojn por konstrui, bildolibrojn, pupon, fervojeton. La Kristnaskan etoson mi ege ŝatas, la solenan vespermanĝon, la abian odoron en la ĉambro, kaj la lumadon de kandeloj.

Eĉ etan Kristnaskan stalon ni havas, ene Jesueto el gipso, ĉirkaŭe la gipsaj Maria kaj Jozefo, kaj la Trireĝoj, la paŝtistoj, ĉiuj el gipso kaj kolore pentritaj, kaj gipsa azeno, gipsa bovino, do, la tuta Betlehemo, kaj malantaŭe trovigas eta bulbo, ĝian lumon kolorigas ruĝa celofanpapero, ĉio estas tre bela. Mi ĉiam emociiĝas, ĉar la stalo rememorigas la infanecon. Kaj poste ni aŭskultas la kanton „Silenta nokto", la diskon alportis la filo iun jaron, ĉiufoje ni metas ĝin sur la gramofonon, dume fajreras la stelŝutiloj, serioze, mi emociiĝas, ploremo strangolas la gorĝon, tiom saturas min la amo. En tiaj meditadoj mi enmetiĝis, kaj eĉ pri tio mi pensis, ke la tago baldaŭ finiĝos; la fraŭlino je la kvina elŝaltis la kafmaŝinon, la ĉefo kontrolis la kason, en la fono, en la hungareska salono estis jam estingitaj la lampoj, do resume, ni ĝuste volis fermi la ejon, kiam envenis tiu homo.

Mi pensis, ke li trinkos ion kaj poste rapidos hejmen, kiel la aliaj.

Diablo scias, kiomjara li estis, nek juna, nek maljuna; li ne mienis kiel ia riĉulo, la hararo balais la ŝultrojn, maldika, sengrasa li estis; barbo kaj lipharoj kungluiĝintaj pro la nebulo. Li haltis ĉe la pordo, rigardante unue min, poste la knabinon, kapjesis kaj kuntiris la surtuton; li staradis tie esperante, kvazaŭ oni devus saluti lin bonkore. Mi alpaŝis la servotablon, por ke ni povu rapidi se li petos ion, sed la viro ne malfermis la buŝon.

– Kafon mi jam ne povas pretigi – deklaris la knabino.

– Kafon ni ne havas – diris mi al la ulo. – Tuj ni fermos. Kion mi donu al vi?

– Ĉu mi rajtas sidiĝi? – li demandis mallaŭte.

Kial ne, li sidiĝu, ni ankoraŭ ne fermis. – Bonvolu – mi diris malvolonte. Eble li rimarkos tion. Sed tute ne; kvazaŭ la plej afable mi estus ofertinta al li lokon, li feliĉmiene sidiĝis ĉe tablo proksima de la hejtilo.

– Kion mi donu al vi? – urĝante mi demandis.

Milde li alrigardis – nu, tamen, mi konas jam la tiom mildajn alrigardojn! Mi vidis jam multajn strangulojn, kiuj unue aspektis mildaj.

– Vinon – li diris.

– Ni havas vinon en botelo.

– Jes.

– Botelojn sepdecilitrajn. Abasári, Furmint, Leányka.

– Kaj ruĝan vinon, ĉu vi havas?

– Ankaŭ tian.

– Eble ruĝan mi petas.

– Donu botelon da Kékfrankos – mi diris al la knabino. Ŝi deprenis el la breto kaj eĉ ne viŝis la botelon, tiel ŝi transdonis ĝin. Grimacante, kvazaŭ ŝi dirus, ke nur tio mankis.

Mi alportis la vinbotelon kaj glason sur pleto. Elverŝante la trinkaĵon, mi atente rigardis la gaston. Li varmigis sin, kun ambaŭ manplatoj sub la akseloj; liaj okuloj estis fermitaj, kaj kiam mi finis la priservadon, la viro suprenrigardis kaj ridetante etendis la manon por preni la glason.

– Ĉu vi trinkus kun mi?

Mi jam estis reiranta al la servotablo, kiam li demandis tion. La knabino estus kaptebla, mi vidis tion, sed mi tuj intervenis.

– Ne, sinjoro, ni dankas.

Ĉar mi rimarkis ion. Mi rimarkis tion, kiam li volis preni la glason.

– Mi estus ŝatinta, se... – provadis la ulo, senkuraĝe.

– Ne, sinjoro, ne! – firme mi diris. Proksimiĝu, mi mansignis al la knabino. Ŝi kliniĝis super la servotablo. – Rigardu, kiaj estas liaj manoj!

La knabino alrigardis super miaj ŝultroj.

– Ĉu vi vidas?

– Io okazis al li – diris la knabino, surprizita.

– Nu, vere!

Mi turniĝis, kredante, ke la ulo denove metis la manojn sub la akselojn. Sed mi eraris. Li sidis rektatalie, kun ambaŭ pugnoj ripozantaj sur la tablo, kvankam tiel nek la mandorso, nek la palmo vidiĝis, nur la kunpremitaj pugnoj.

– Mi estus ŝatinta, se vi trinkus kun mi – li diris bonvole.

Mi silentis. Malantaŭ mia dorso la knabino kubutumis sur la servotablo. Nun la viro rigardis ŝin. Bone, vi nur rigardu, mi pensis. Ne al tiaj figuroj ŝi estas alkutimiĝinta. Se vi vidus ŝiajn knabojn, mi pensis. Aŭ la aŭtojn de ŝiaj knaboj. Se vi vidus, kiuj tempopasigadas ĉi tie, pro ŝi. Bonforma knabino ŝi estis, antaŭ nelonge veninta el iu urbocentra kafejo. Kial, tion mi ne demandis, estu afero de la ĉefoj. Ŝi sorĉe altiris la virojn, en minijupo kaj profunde dekoltita blanka

pulovero. Eĉ mi ĉiufoje gapadis al ŝiaj brustoj. La knabino sufiĉe ŝminkis sin kaj vidiĝis, ke ŝi pagas sumegojn al kosmetikistoj kaj frizistoj. Malantaŭ mi ŝi kubutumis, mi tamen flaris odoron de diversaj aspergiloj. Sed mi jam ne estas juna. Krome, tiam nenio interesis min, nur ke ni fermu.

– La afero statas tiel, ke nenien mi povas iri – rimarkis la viro.

– Nenien? – la knabino ne singardis.

– Nenian proksimulon mi havas. Ĉu ni ne pasigu kune lă vesperon?

– Kun mi tute ne, imagu – ekridis kurte la knabino.

– Mi volis diri, ke ni ĉiuj. Kune.

– La sinjoro ŝercas – mi diris malafable.

Li ne respondis tuj, gapadis, per la pseŭdomildaj okuloj.

– Ĉu vi pensas, ke mi ŝercas? Ĉar tute serioze mi demandis.

– Ĝuste kun vi mi volas! – replikis la knabino. – Cetere, hodiaŭ estas Kristnaska vespero.

– Cetere? – demandis la viro, kun ironio en la voĉo.

– Jes, cetere! Se eble vi ne scius, ĉi-tage ĉiuj rapidas hejmen.

– Sed fus mi diris, ke mi povas iri nenien.

– Tio estas via problemo.

– Ĉu vi opinias?

Al mi jam sufiĉis.

– Trinku, sinjoro, trinku! Se entute ankoraŭ utilas al vi, se vi trinkas. Rapidu, se eblas peti.

– Eble vi volas forpeli min?

Mi silentis, ĉar la plej volonte mi tuj rebatus, jes ja, vere!

– Do, finfine, vi ne kuntrinkas? Nun, ĉi tiun tagon?

Estis terure nervozige, ke li nur sidadis tie, eĉ por la trezoroj de la tuta mondo ne tuŝante la glason.

– Kaj kio okazu al tiuj, ekzemple ĉi tiun vesperon, kiuj havas nenian hejmon por kien iri? Vin mi demandas – li alrigardis la knabinon.

– Tio tute ne koncernas min!

– Vin tute ne interesas tio?

– Min tute ne – ridis la knabino, nervoze.

– Vi pensas, ke eĉ paroli ne indas pri tio?

– Min tute ne interesas – diris la knabino.

– Do, kio interesas vin?

– Vidu, sinjoro, ne estas nia devo konversacii – mi diris. – Kaj baldaŭ ni fermos.

– Kien vi rapidas?

– Li envenas kaj incitas nin – alrigardis min la knabino.

– Pri tiafo tute ne temas – diris la viro, ridetante. Lia rideto estis irita. – Mi ŝatus nur scii, kiamaniere oni aranĝis la mondon.

– Kaj ĝuste ni klarigu tion? Ĝuste unu minuton antaŭ la fermohoro?

La ulo silentis, sed li certe atendis respondon. La knabino ekmordis la hokon.

– Nu, bone! La mondo estas aranĝita tiel, ke ĉiu havu eblecon prosperi. Ĉi tiu nia mondo estas tre bela! Eĉ tiam, se al vi iakaŭze ĝi ne plaĉas, ĉu vi scias? Ĝi alkutimigas nin esti lertaj. Riproĉu sin mem, kiu ne prosperas. Kaj li ne kverelu kun la pli feliĉaj!

– Do estas tiel?

– Ni ne kulpas, se vi estas sola. Kaj se vi malbonŝancas pro io, tion ne kun ni pritraktu.

– Ĉar vi ne interesiĝas pri tio, ĉu ne?

– Ĉesu diskuti kun li – mi deadmonis la knabinon. Ĉar el tiu afero jam ĝistede sufiĉis al mi, efektive.

– Rigardu, sinjoro! – mi pli proksimiĝis al la ulo. – Vi nur ĝoju, ke ni ne tro interesiĝemas. Espereble vi komprenas, kion mi aludas?

Nu, tiu senkulpa rigardo! Min igis kolerega.

– Ĝoju, sinjoro, ke mi ne demandas, kial viaj manoj estas sangumitaj!

Nenia surprizo. La viro levis la manojn malrapide kaj disetendis la fingrojn.

– Pri tio vi pensas, ĉu?

Palmomeze vidiĝis grava vundo.

La knabino ŝrikis.

– Kio al vi okazis, mi ne esploros. Kvankam mi povus fari. Pri tiaj tipoj, kia vi estas, multon oni supozas. Sed mi petas nur, ke vi fortrinku la vinon kaj eliru!

Eĉ ne ektremetante, la viro montris ankaŭ la alian palmon.

– Jen alia vundo! – ekkriis la knabino. Ŝia voĉo, krom timiĝo, konjektigis ankaŭ kompaton. La ulo rimarkis tion kaj kapjesis kun dankema rideto. Mia pacienco jam elĉerpiĝis, sed mi bridis min.

– Ne interesas min viaj vundoj! Mi diris jam.

– Tamen vi povus interesiĝi pri ili.

– Mi ne volas miksiĝi en viajn aferojn. Por ripeti, mi nur petas vin...

– Tamen vi enmiksiĝis. Nur ne tiel, kiel vi pensas.

– ... mi nur petas vin, trinku, pagu kaj...

– Vi eĉ ne konjektas, kiaj vundoj estas la miaj?

Blanka kiel muro mi estis pro ekscito, tiafo neniel mankis al mi. Mi streĉis esti trankvila.

– Ne, sinjoro. Povas esti, ke vi vundiĝis nur hazarde. Sed ankaŭ povas esti, ke vi kulpas pri io, kaj tiuj vundoj ne estas hazardaĵoj...

– Ĉu doloras? – demandis la knabino, maltrankvila jam. – Ĉu mi ne povus fari ion?

Mi alrigardis ŝin: – Ni ne vidis tiujn vundojn! Li ne miksos nin en ion ajn!

Sufiĉe laŭte mi parolis, kaj mia voĉo vokis la ĉefon el la oficejo.

– Kio okazas, kolegoj?

– Nenio – mi diris en tia voĉtono, kia komprenigis al la ĉefo, ke mi diskrete volas forigi lin el tiu ĝena okazantaĵo. – La sinjoro ĝuste volas pagi kaj li foriros. Ni fermas.

– Jes, ni fermas – ripetis aŭtomate la ĉefo. Ĵetante rigardon al la gasto, li ekvidis la ankoraŭ alte tenatajn, vunditajn palmojn de la ulo. La vortoj haltis sur liaj lipoj. – Pro la glaso...?

– Do ne, ĉefo, estas nenio... – Mi flankentiris lin kaj haste rakontis ĉion. Dume la ĉefo alrigardis la ulon kaj kaptis mian jakon, aŭskultante la klarigon.

– Rigardu! Ankaŭ lia ĉemizo... Ĉe la flanko!

Okulumante malantaŭen, ankaŭ mi povis vidi: la viro malfermis la surtuton kaj aperis la ĉemizo, kun ruĝa makulo.

La ĉefo mansignis al la knabino.

– Ni devus voku la policon.

– Ĉu nun? Eh! – mi kvietigis lin. – Ili ne tre ĝojus, se ĉi-hore... vi ja scias, Kristnasko-vespere... Kaj poste, ili nur molestus ankaŭ nin. La familio jam atendas... diablo forportu lin, ke li eniris ĝuste ĉi tien!

– Bone – diris la ĉefo. – Tiam forfetu lin kiel eble plej baldaŭ.

Kaj li retiriĝis en la oficejon.

Kun la knabino ni reiris al la servotablo.

La ulo ekstaris, ankoraŭ alte tenante la palmojn; nun klare vidiĝis ankaŭ la sangumita ĉemizo.

– Ĉi vundoj – li komencis milde, sed la knabino eligis krion.

– Foriru de ĉi tie!

Mi faris abrupte la fakturon kaj etendis ĝin sub la nazo de la viro.

– Tridekdu kaj kvardek! Kaj iru for, ĉar ni fermas la ejon!

– Mi nur ŝatus rememorigi vin...

– Nenion vi ŝatu!

– Sur miaj palmoj, flanko kaj piedoj... Ĉi-vespere...

– Ĝoju, ke ĉi-vespere ni ne volas aŭdi pri viaj dubaj aferoj! Ĝoju, ke ĝuste tiun kvietan vesperon... Komprenite? Alifoje vi ne transsavus vin! Tridekdu kvardek, kaj ĝis!

La ulo retroiris, mallevante finfine la manojn. Li kalkulis la monerojn kaj metis ilin sur la tablon. Silente ni atendis. Perforte mi ne volis forfeti lin, kvankam mi jam staris sur tiu punkto. Li retiriĝis ĝis la pordo. Ni ambaŭ staradis ĉe la servotablo, dume ke li ne ĉesis gapadi al ni, per tiu milda, petega rigardo. Tiam mi kredis, ke li diros ankoraŭ ion, ĉar liaj lipoj foje-foje konvulsiis. Sed li foriris, senvorte.

– Nu, rapide malsuprenigu la ŝutron – mi diris.

La knabino helpis ordigi la ejon. El la botelo mankis nur tiu decilitro, kiun mi elverŝis. Sed ankaŭ ĝi restis en la glaso.

– Ĉu li foriris? – enrigardis la ĉefo.

– Li eĉ ne fortrinkis la vinon – mi montris al li.

– Morgaŭ ni vendos ĝin – la ĉefo ŝtopis la botelon kaj metis ĝin en la glacišrankon. – Morgaŭ, dum la festa tumulto.

– Por momento mi ekkompatis lin – diris silente la knabino.

– Jen via stilo, Veronika – ridis la ĉefo. – Vi kapablas ekkompati eĉ tiajn ulojn.

Kaj ni ridis, ĉar bezonatis jam ioma ridado post la ekscito. Fore ŝvebis fia nebulo. Ni sidiĝis en la aŭto de la ĉefo, la knabino antaŭe, kaj mi en la malantaŭa loko. Ekveturante mi spionadis tra la fenestro, ĉu vidiĝas ie la ulo. Sed li malaperis. Komplete li malaperis, ĉar nenie mi vidis lin.

Nu, poste mi iom trankviliĝis ene de la agrable hejtita aŭto.

El la hungara: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

Marjorie Boulton

Zamenhofa stilo

La pura zamenhofa stilo –
tion ni celas; ni disputas
dum sur la muro en trankvilo
la Zamenhof-portreto mutas.
Dum al la celo ĉiam sama
ni strebas, akraj vortoj vundas;
pro amo al la lingvo ama
etaj malamoj ekabundas.

Se iu vivas en mizero
kiu kapablus esti riĉa,
sed per servado kaj ofero
sin igas fakte pli feliĉa,
se tiu dum la viv' persistas,
hardita, dediĉita ilo,
en tiu homo jam ekzistas
la pura zamenhofa stilo.

Kelkloke estas malfacilo
pri iu stilopunkto duba;
unu detalo inter milo
ŝveligas sin ĝis prem' inkuba,
timigas nin kaj nin sufokas.
Dum ĉiu sin proklamas prava,
krioj kaj kontraŭkrioj mokas
en vasta nigra vako kava.

Jen, unu vivas en angoro,
sed spitas riskojn kaj instruas;
unu per ada trolaboro
sin mem por nia cel' detruas.
Jen oferita karier';
jen, pro principoj, sinekzilo;
kie ajn flamas sinofer'
jen pura zamenhofa stilo.

La paĝo, frazo, eĉ la vorto
ĉe polemiko perdas sencon;
sed antaŭ dummilita morto
Zamenhof kreis precedencon.
Kie du homoj malkonsentas
sed restas mildo kaj ĝentilo,
jen ambaŭ certe elokventas
laŭ pure zamenhofa stilo.

La vortoj estas vortoj nur,
facila vento, ne kutimo;
pli gravas viva stilopur'
la gramatik' de grandanimo;
se du pri stilo ekdebatas,
ĉiu sin konas erarpova,
kaj la alian daŭre ŝatas,
jen jam la stilo zamenhofa.

Se fraton frat' pardonas ame,
aŭskultas pacience plendon,
se iu suferant' sendrame
silente glutas la ofendon;
se iu serĉas ĉe alia
bonajn motivojn en humilo,
jen, ĉe konflikto opinia,
la pura zamenhofa stilo.

Ĉe nia Nun kaj Tie-ĉi,
la Estonteco lumas jam,
la tuthomar' en harmoni',
revo de zamenhofa am';
ni strebu al la rev-plenum',
en ĉies koro restu brilo
de la fratiga amo-lum' –
plej grava zamenhofa stilo.

Harrogate, 7-8-an de aŭgusto 1961

ORIGINALA POEZIO

Edwin de Kock

Ekleziaj momentoj

1.

FIDFRATINOJ

Post ĉi Diservo
la familion de Kock
ĉe sin invitas
geadventistoj Babu,
en Sud-Afriko.

Tagmanĝe ni gustumas
spican kulturon.
Trans hulverdoj Barati.
Jarmilojn vasta
homriĉo. Blanka stulto
en Sud-Afriko.

Forirsalut elviŝi
ĉiujn distancojn.
Mia spontana Ria,
en Sud-Afriko,
ekkisas la Hindinon.

26.6.1981

2.

ANTAŬ LA KOMUNIO

Genuante, mi
lavas brunajn piedojn
de frato Babu.
Tutekzemple Jesuo
por Sud-Afrika duo.

29.6.1981

Teodora Keszi

Ne-skribante

De sunbrilo-desegnitaj paperfolioj
de falko-skrapvundita ĉielo
kun paperaviadiloj
kaj mi kombas la harojn de la vento
ja ekstravagance printempo estas
la kato sian voston pelas
mi elprenas el deponejoj de la vintro
miajn hirtajn sonĝojn pasintjarajn
hejmenrevenintaj cikonioj nestas
en miaj brunaj okuloj
de sunbrilo-desegnitaj paperfolioj
ne-skribitaj momentoj de mia ĝojo.

Jiři Kořinek

Medito de migranto

La vivo estas vago,
tra tempomallumegoj,
la vivo estas pago
por antaŭulaj pekoj.

La vivo estas knedo
fare de nia sorto,
kaj lambaston' la kredo
sur voj' de nask' al morto.

Ja iu kredas Dion
kaj tiu fid' lin helpas,
kaj iu materion
kaj el ĝi forton ĉerpas.

Sci' mankas, kiu pravas
kaj kie cel' homara,
kaj kio pleje gravas
sur nia driv' tempmara?

Julius Balbin

Liberigo

Mi palpserĉis en mallumo
kaj la fajreroj de viaj okuloj
eke
lumigis mian vojon

Mi estis kurbigita per la hororo de l'
pasinteco
sed vi rektigis min
ŝildo kontraŭ koŝmaroj

Mi estis prizonulo de mia memo
kaj via varmo
malŝlosis la ĉelon

Mi estis amarigita de homoj
kaj via boneco
helpis min trovi
la perditan esperon

Mi estis surdigita per la bruego de l'
vivo
kaj vi enmanigis al mi
la donacon de l' amikeco

Mi serĉis amon
kaj via rideto
tuŝis min

Oldřich Knížal

Ĉe l'bordo Atlantika

En glitaj amasoj vertiĝas onda mont'
averte tenebras la vasta horizont'
trans akva senfino ekvelas la ŝipo
markroze drivas aŭdaca vir-ekipo
La nigra kaj la blua koloroj de l' ĉiamo
sur malproksimega konverĝas meridiano
la nigra kaj la blua alianco helprifuza
de l' sorto ŝipanara suveren' obtuza
vivantoj mil kaj mil jam tie ĉi alfundis
al sepultisto granda riveroj abundis
de l' sango batalkampe elverŝita
sur kontinento aŭ sur ŝip' perdita...
Spite al maligno tioma malgraŭ tempesta mar'
transe al bordo distanca navigas ŝipanar'
denove krozas ŝipo denove sturmas elementoj
kun muĝo elprofunda ĥoralo de l' ventoj
denove birda kriĉ' en altoj la foraj horizontoj
nin pelas kroze trans la mar' de l' desapontoj

Internacia fervojista Esperanto-Kongreso

Kongresejo de la 34a IFEF-Kongreso Balatonfüred

Dudek jarojn post la sukcesplena 14-a IFEF-Kongreso, aranĝita en Budapeŝto, denove en Hungario – konkrete en Balatonfüred en majo 1982 – okazos la 34-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. Pri tio decidis la Komitato de la menciita organizaĵo en Regensburg dum la 33-a Kongreso. La Fervojista Faksekcio de HEA ricevis la honorigan taskon organizi tiun kongreson.

Antaŭ ol detale pritrakti la organizadon kaj programon de la 34-a, estas inde retrorigardi pri la antaŭaĵoj: unue mi deziras citi la antaŭlastan frazon de mia artikolo skribita en Esperanto (n-ro 680/7-8. 1962. p. 134.) „Ni ne promesis multe, tamen, se nia kongreso kaj nia lando, Budapeŝto kaj Balatono faris ĝojon por la partoprenintoj, tiel ni estas kontentaj, havante tiun senton, ke nia laboro ne estis vana." Jes, alvenis la tempo por la hungaraj fervojistoj esperantistoj denove pruvi, ke ili kapablas ripeti tiun imponan 14-an IFEF-Kongreson, kies partoprenintoj (1000 kongresanoj) eĉ nuntempe memoras ĝin, la plej grandioza en la historio de IFEF. Fakte ni ne promesas multe ankaŭ ĉi-okaze, tamen ni fidas, ke ni povos havigi neforgeseblajn travivaĵojn por ĉiu partoprenonto dum la 34-a.

Koncerne la 33-an: ses hungaraj fervojistaj esperantistoj veturis al Regensburg, parte por informiĝi kiel la germana IFEF-Sekcio aranĝis la ĉijaran kongreson, kion novan la LKK preparis kaj prezentis al la partoprenantoj, kaj parte raporti pri la agado de nia sekcio dum la lasta jaro, kaj ne laste por efektivigi efikan propagandon pri la 34-a.

Novaĵo estis en la abunda programo – konsistanta el distra kaj faka parto – parado de la uniformvestitaj reprezentantoj de la ĉeestantaj landaj fervojistaroj – inter ili Mária *Sámson* (vicestrino de la Pionirfervojo) kaj János *Patay* (Fervoja Direkcio de MÁV-Budapeŝto) – literatura konkurso kaj funkciado de fervojista radioamatorstacio, kies manipulantoj (ankaŭ la subskribinto) estigis 150 interkontaktojn (QSO) dum 3 tagoj kun radioamatoroj de 21 diversaj landoj.

El la distra programo – speciale el la ekskursoj – por mi estis la plej memorinda la vizito en Walhalla (Panteono de elstaraj germanaj sciencistoj, ŝtatviroj, artistoj, k.a.)

En la faka programo okazis kunsidoj de la Terminara Komisiono, kiu depost jaroj – en kadro de internacia kunlaboro – preparas la Esperantan tradukon de Lexique Generale (6-lingva fervoja fakvortaro de UIC – Internacia Fervoja Unuiĝo) enhavanta pli ol 11000 fervojajn fakesprimojn. La rezulto de tiu komuna agado, la Esperanta traduko – krom la franca, germana, angla, itala, hispana kaj nederlanda – estos la sepa lingvo aplikota en formo de suplemento en la proksima 4-a eldono de LG. En tiu laboro la Terminara Komisiono de la hungara IFEF-Sekcio tre aktive agadas, nome ĝis nun ni tradukis la C- kaj T-literan partojn (1636+992 fakesprimojn) kaj per tio nia TK gajnis plenan rekonon de la IFEF-Estraro kaj tion de la alilandaj TK-j.

Elstara evento estis la fakprelego de kolego Gernot *Rotterspach* – altranga funkciulo de Germana Federacia Fervojo – pri la „Trajno sen radoj" (Elektromagnet-Ŝveba Veturilo). Kolego Rotterspach prezentis per filmo kaj lumbildoj la eksperimentojn kaj la jam funkciantan veturilon. (Dum la eksperimentoj oni atingis per tiu veturilo rapidecon de 500 km-j).

Elvoki la interesiĝon de la kongresanoj pri la 34-a, ni kreis „informservo"n en la kongresejo, ĝi funkciis dum la tuta kongreso kaj faris sukcesan propagandon. Krome ni prezentis per koloraj lumbildoj kaj kinofilmo la estontan kongreslokon kaj la ĉefajn vidindaĵojn de la Balaton-regiono. La bone organizita propagando portis konsiderindan rezulton al nia grupo, nome jam tie en Regensburg pluraj gekolegoj anoncis sian aliĝon al la Kongreso en Balatonfüred.

Baze de la ĉi-tie skizitaj antaŭaĵoj la hungara IFEF-Sekcio havanta la moralan kaj materialan subtenon de la Fervojista Sindikato kaj tion de la kompetentaj instancoj de la Hungara Ŝtatfervojo MÁV – ekagis, LKK estas fondita kaj komencis la preparlaboron. Kaj la faka kaj la distra programo estas preta, tio kontentigos tutcerte ĉiun partoprenonton de la 34-a IFEF-kongreso.

Nur specimene ni menciu kelkajn erojn el la programo: krom la inaŭgura solenaĵo kaj estraraj kaj komitatkunsidoj, ankaŭ fakprelegoj, enketo de la Terminara Komisiono ampleksigos la oficialajn eventojn. En la kadro de tn. „Distra bukedo" amuzos la kongresanojn prezentadoj de fervojistaj kulturensembloj, deklamartisto, kantistoj ktp. Dum unu el la ekskursoj la kongresanoj aŭdos orgenkoncerton en la famekonata abateja pregejo, situanta sur la duoninsulo *Tihany*. Krozado per ŝipo sur la lago Balatono, vingustumado, muziko kaj – nature – la hungaraj gastronomiaĵoj faros neforgesebla por la partoprenontoj la kongreson en Balatonfüred.

Agado de la LKK kaj kontribuo de la hungaraj fervojistaj esperantistoj celas – paralele kun la fakaj traktadoj – ĉefe la interkompreniĝon de diversnaciaj homgrupoj kaj la plifortigon de la internacia paco. Ni esperas, ke tiu nia plano efektiviĝos, kaj pere de la internacia lingvo Esperanto ni faros bonan servon kaj por nia patrujo Hungario, kaj por la ĝenerala Esperanto-movado.

Fine: por sukcesigi nian strebadon, ni kore invitas la internacian fervojistan esperantistaron al Balatonfüred!

Lajos *Kapitány*

Super mi kantas vento

Imre Szabó

Salomono!
kial forgesi
la Altan Kanton,
se oscedas
malplenė
via ĝardeno,
super spuroj
de la fianĉino
disŝiriĝas
la mirho
kaj la aromaĵoj?
Kial vi forgesas,
ho, Salomono,
la ŝafidojn
paŝtatajn
montare,
la gutojn
de mirho,
la aromon
de amoro?
Vi ŝvitas,
Reĝo!
Timu!
Via falinta krono
gemita de larmoj,
kun mallumaj okulkavoj
rigardas vin
la Eterna Urbo,
blindas
la diamanta domo
de dio...

Ho, Reĝo!
Forta!
Saĝa!
vi singultas,
kaj larmoj rosas
viajn okulojn,
kvankam ŝafidoj
paŝtiĝas
montare,
kvankam altas
ankoraŭ
la cedroj –,
kien foriris
via amatino,
la belulino
inter virinoj,
kien forturniĝis
via amatino?

Ho, Reĝo!
Malplenas
la ĝardeno,
facile
vualas ĝin
la vento
la bedoj
de aromaĵoj
elspiras
nur odoron
kadavran.
Reĝo!
ĉi odoro
svingiĝas
el via koro!
Reĝo!
ĉi tombo
profundas
en via animo!

Reĝo!
ĉi venta vualo
estas
via vizaĝo!

Reĝo!
Ekstaru!
Ekstaru, kiel decas al viro!
Ekstaru, kiel decas al ŝtono!
tombŝtono
marmora!
ne ungŝiru
la cikatron:
ĉi-tombon,
lasu
la imagatan
ĝemploron
de mortintoj!
Reĝo!
Kantu
la kanton
eternan,
ĉar eternas
nur la kanto,
kiel skribaĵo
super mortintoj
dispolviĝantaj.
Esti tombo,
resti tombo...
viva karno
kovru vin
en robo fianĉina,
viva karno
kovru vian
korpon falintan,
ho, amatino
mia iama;
heroldu
ĉi-vizaĝ'
kun cikatroj
krucaj
vin, amatino!
Paŝtiĝas
ankoraŭ
la la ŝafidoj
blankaj,
staras
ankoraŭ
la cedroj
de Lebanon,
kaj ondas
maro
de aromaro...

Tamen!
la ŝafidoj
kuŝas
morte,
miaj cedroj
tertreme
falis
trakore,
la aromaro
de amoro
nur fora
memoro;
elĉerpiĝis
jam
eĉ
la
maroj
subvizaĝaj
de
la
larmoj

tra
la
korpo
sin
strecas
klinge
tintaj
alarmoj,

tra
la
vespera
krepusko
ekŝajnas
por
fojo
viaj
mamoj,

kaj
tuj
malaperas
kiel
montetoj
en
de
la
nokto
manoj

Ruiniĝu Jerusalemo!
Ruiniĝu la diamanta domo!
Disruiniĝu potenco, vivo!
ĉar ĉio-ĉio
altiĝis
por via
adoro,
nur por vi
blankaj
ŝafidoj,
nur por vi
cedroj
de Lebanon,
nur por vi
montetoj
aromaj.
Okulvaste ruiniĝu ĉio!
Sur la
ruinkampo
mi sola,
mi sola
tomboŝtono
devas
stari,
kvankam
kaduke
genue,
survizaĝe
kun kruco
dolora...

Super mi vento kantas vin.

Kristnasko en la nuna Hungario

Laŭ la Kristanaj religioj Kristnasko estas la memorfesto de Kristo, la 25-an de decembro. Tiu festo ricevis la nomon, laŭ la latina vorto «incarnatio» pri la enkorpiĝo de Jesuo. La tagojn de Kristnasko nuntempe ĝenerale ĉie en la mondo oni rigardas la festo de la amo. Ĉe diversaj nacioj ekzistas diversaj kutimoj, eĉ, en la sama lando, laŭ sociaj klasoj oni sekvas diversajn kutimojn. En Mez-Eŭropo la plej disvastiĝinta kutimo estas la starigo de pinarbo, kiu estas la unusola verdanta arbo de la vintraj arbaroj.

Jam la antikvaj popoloj rimarkis, ke de la 25-a de decembro jam komencas plilongiĝi la tagoj, mallongiĝas la noktoj kaj proksimiĝas la printempo. Por kristanigi la «paganan» feston, en la jaro 354 oni decidis, ke ĝi estu la Kristnaska tago. Dekoritajn pinarbojn en Eŭropo unuafoje oni uzis en la 18-a jarcento en Strasburgo. Al Hungario dum la pasinta jarcento tra Vieno alvenis tiu Kristnaska kutimo.

Ĝis la mezo de la 20-a jarcento la Kristnaska festo estis ligita al la religio. Ankaŭ post la dua mondmilito multo konserviĝis el la kutimoj: restis la starigo de pinarbo, restis la donaca kutimo inter la familianoj, restis la reciprokaj salutoj per koloraj poŝtkartoj inter amikoj, sed la religia festo transformiĝas al paca familia festo. Mem la ŝtato starigas pinarbojn en la Parlamentejo kun donacoj por la infanoj, kaj sur diversaj placoj, en kulturdomoj, stacidomoj brilas la Kristnaskaj lumoj por tiuj homoj, kiuj estas solaj aŭ forestas de la familio.

Grandega Kristnaskarbo en la kupolo-halo de la Parlamentejo

... la ravita publiko

En la antaŭa vespero de la festo, la 24-an de decembro, posttagmeze oni ĉesas labori, fabrikoj, vendejoj kaj oficejoj fermiĝas, eĉ tramoj, aŭtobusoj ne trafikas en la urboj. Ĉiu homo portante pakaĵon rapidas hejmen por festi en familia rondo.

Ĉiu festo havas sian propran ĉarmon. Ĉiu festo estas bela, de ĉiu festo ni atendas kaj plej ofte ni ricevas ion. Nia animstato estas tute alia, la ĉiutagajn zorgojn forgesigas la preparĝo por la festo, la antaŭĝuo de la ĝojo donaci. Antaŭ la festotagoj ni aĉetadas, planadas kaj atendas gastojn.

La urbaj junaj familioj plej ofte per aŭto vizitas la gepatrojn, kiuj loĝas en vilaĝoj.

La alia varianto estas, kiam la maljunaj gepatroj aŭ parencoj estas invititaj al la urbo. Tiam en la stacidomo ĉe la trajno atendas ilin la junaj idoj kaj helpas hejmenporti la multajn pakaĵojn plenigitajn per kolbasoj, ŝinkoj kaj aliaj nutraĵoj. En la granda betonkonstruaĵo sur la 9-a etaĝo la gemaljunuloj sentas ioman ĝeniĝon, apenaŭ ili havas kuraĝon elrigardi tra la fenestro. Tamen la festo glate pasas, brilas la pinarbo, la genepoj ludas sub la arbo per la donacoj.

Estas konate, ke hungaroj ŝatas manĝi ĉefe grasajn, spicitajn manĝaĵojn, sed la 24-an vespere ĉie rostita fiŝo (iama simbolo de kristanoj) kun terpomsalato estas la kutima menuo. Sed dum la sekvaj du – laborpaŭzaj – festotagoj ili laborigas siajn stomakojn per buljono, farĉita brasiko, gulaŝo kun farunaĵo, rostita anaso aŭ meleagro, gratenita viando, diversaj porkaĵoj kaj tranĉaĵo, kukoj kaj kompreneble – vino.

La Kristnaska idilia harmonio – eĉ se ĝi estas nur kelktaga paca «insulo» en la aferplena jaro – beligas la vivon por ni ĉiuj. Ni ĝuu tiun harmonion ankaŭ ĉi-jare.

Szilárd *Bálint*

PANORAMO *

En bela sunbrila aŭtuno mezlernejanoj helpas rikolti pomojn en ŝtata bieno

Kiel ĉiujare, ankaŭ aŭtune de 1981 tre multaj (ĉ. 60 000) gelernantoj kaj gestudentoj helpis ĉe la rikoltado de fruktoj en la hungaraj agrikulturaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj. La gejunuloj ricevas kutiman salajron por sia laboro: diligentuloj povas gajni belan sumon dum la ordinare unusemajna laborado.

La mane rikoltitaj fruktoj –precipe pomoj – havas sufiĉe grandan proporcion en la agrikultura eksporto de Hungario; dum 1980 estis eksportitaj 400 000 tunoj da pomoj, kaj per tio nia lando estis la dua plej granda eksportanto en Eŭropo.

Kvintaga semajno

Meze de tiu ĉi jaro ĉiu hungara entrepreno devis fari la unuajn paŝojn por transiri al la kvintaga laborsemajno. Ĝis nun en Hungario ordinare estas libera ĉiu dua sabato: la registaro decidis, ke depost la 1-a de januaro 1982 praktike ĉiu hungaro laboros nur kvin tagojn dum la semajno. Tiu decido neprigas plibonigon de la organizo de laboro kaj kreskigon de la produktiveco, ĉar pro la malkresko de la laborhoroj la salajroj ne povos malkreski.

La kulturaj instancoj kaj diversaj civilaj asocioj, unuiĝoj ktp. faras detalajn planojn por oferti al la homoj interesajn programojn por liberiĝontaj tagoj, kiuj dum jaro sumos 27.

En la lernejoj oni prokrastis la enkondukon de la liberaj sabatoj; necesos ioma tralaborado de la instruprogramoj kaj eventuale aliaj reformoj, unuavice pro tio, ĉar la lerneja jaro en Hungario daŭras entute nur 192 tagojn – t.e. ĝi estas la plej mallonga en Eŭropo.

Furora pop-bando

La hungara pop-muziko kaj hungaraj pop-bandoj jam de ĉ. 45 jaroj estas tre popularaj ankaŭ ekster la limoj de Hungario, precipe en socialismaj landoj. Lastatempe elstaras la ensemblo „Lokomotiv GT", kiu koncertis jam en ĉiuj socialismaj landoj, interalie ankaŭ en Sovetio, kie la granda stadiono Luĵniki tute pleniĝis por la koncerto de la hungaraj muzikistoj, kvankam enirbiletoj havis piprajn prezojn.

Lastatempe „Lokomotiv GT" sukcesis iom penetri ankaŭ la muzikan mondon de Okcidenta Eŭropo. Unika estas la trijara kontrakto, kiun la konata muzika entrepreno EMI subskribis kun la hungaraj muzikistoj, kiuj nun havas realan ŝancon konkeri la muzikamantan junularon de la tuta mondo, ĉar dum la daŭro de la kontrakto EMI eldonos kaj per la propraj kanaloj vendos tri diskojn de „Lokomotiv GT".

La ensemblo „Lokomotiv GT"

La populara restoracio „Kalocsa" de Hotelo Hilton en Budapeŝto

* PANORAMO

L. Krug kaj Zs. Németh post la „jubilea" transoceana flugo

Budapeŝto – malmultekosta urbo

La brita revuo *Financial Times* de tempo al tempo publikigas liston pri la atendeblaj kostoj de vojaĝantaj komercistoj en la ĉefaj urboj de la mondo. Oni komparas diversajn prezojn (hoteloj, restoracio, taksio ktp.), uzante kiel bazon la koncernajn prezojn en Londono. Oni formas ankaŭ ĝeneralan indekson de preznivelo, sur la sama bazo (Londono – indekso 100). Laŭ tiu listo la plej multekostaj urboj estas Bridgetown (150) kaj Abu Dhabi (143); la plej malmultekostaj Belgrado (46), Nicosia (45) kaj Pekino (36). La indeksocifero por Budapeŝto estas 66 – tio signifas, ke la hungara ĉefurbo troviĝas inter la relative malmultekostaj urboj de la mondo, kion povas atesti ankaŭ la multaj milionoj da eksterlandaj turistoj, kiuj ĉiujare vizitas ĝin.

Hungara fabriko – en Irlando

La hungara entrepreno Tungsram (ĝi produktas elektrajn lampojn) baldaŭ finos la konstruadon de nova fabriko – en Irlando, proksime de la urbo Cork. La kostoj de investado sumas 10 milionojn da dolaroj: 76 procentoj de la kapitalo venas el Hungario, 10 procentoj el Britujo, kaj 14 procentoj de Irlandaj investantoj. En la fabriko estos 160 laborlokoj: fakte pro tio la Irlandaj aŭtoritatoj ofertis tre favorajn kondiĉojn por la hungara investado. La produktado ankoraŭ ne komenciĝis, sed la entrepreno Tungsram jam esploras la eblojn de eventuala ampleksigo.

Krom tiu ĉi fabriko ekzistas du eksterlandaj Tungsram-filioj: la fabriko *Action-Tungsram* en Usono (New Jersey) kaj *Aslo-Electrical* en Pakistano.

Gy. Endresz kaj S. Magyar post la sukcesa transoceana flugo en 1931

Futurismo – en muzeo

En la Budapeŝta memormuzeo de la hungara poeto kaj verkisto Lajos *Kassák* (1887–1967) dum la frua aŭtuno oni aranĝis specialan ekspozicion kun la titolo „Futurismo". Oni prezentis al la vizitantoj ĉ. 70 librojn, katalogojn, desegnojn, manuskrptojn de tiu ĉi interesa artotendenco; interalie la manuskripton de la manifesto pri la aero-teatro (de F. Azari), fotojn pri la bruo-laboratorio de Luigi Russolo, el la jaro 1916, la „muzikan portreton" de Silvio Mix pri Marinetti, apostolo de futurismo, kaj multajn aliajn interesaĵojn.

Lajos Kassák estis la ĉefa hungara reprezentanto de la modernismaj artotendencoj dum la komenco de la 20-a jarcento, pro tio estis ĝuste lia memormuzeo, kie oni aranĝis tiun ĉi ekspozicion. Ĉiukaze, estis amuze vidi en muzeo la relikviojn de futurismo, kiu celis detrui bibliotekojn, akademiojn kaj muzeojn...

La unuan transoceanan flugon plenumis Ch. A. Lindbergh en 1927. Post nur kvar jaroj, la 16-an de julio 1931 la hungaroj György *Endresz* kaj Sándor *Magyar* plenumis seninterrompan transoceanan flugon inter Usono kaj Hungario. La du pilotoj tiam gajnis per la flugo 10 000 dolaran premion, ofertitan de lordo Rothermere.

Post kvindek jaroj László Krug kaj Zsigmond Németh – du hungaroj, vivantaj en Usono – per sia aviadilo de tipo Beechcraft-Bonanza ripetis la iaman bravaĵon. La 6000 kilometra flugo daŭris 17 horojn, kaj la aviadilo „manĝis" 650 litrojn da benzino.

„Bildpoemo" de Marinetti en la ekspozicio „Futurismo"

malmultekosta,
bongusta novaĵo
HOT-DOG
KOLBASO
48 Ft/kg



HÚSIPAR

REVUO DE REVUOJ

Plurloke aperis alparoloj al diskuto, eĉ nomeblaj plendoj, pro la transitiveco de verboj. Certe, de pluraj jukis jam la mano por respondi, eble akre, ĉar ververe la tuta polemiko iris iom oblikve, por ne diri: naive. El antipodo de nia Eŭropa duoninsulo, NOVZELANDA ESPERANTISTO metis fine punkton al tiu – lingvistike senbezona – polemiko per saĝaj vortoj de Jozefo *Major* (kiun la malnova generacio konas kiel redaktinton de eleganta revuo, de la Japania OOMOTO). Li atentigas, ke temas plejparte pri malfacilaĵoj de anglalingvanoj, kiuj ofte falas en erarojn eĉ en la gepatra lingvo pro la transitiveco. Tiu – kompreneble – ekzistas ankaŭ en la angla, eĉ se la akuzativo ne estas ĉiam klare prezentenda. Major plenrajte elpaŝas kontraŭ reformemuloj de Eo laŭ „naciaj" deziroj, emfazante, ke ne eblas „liberigi lernantojn de la neceso konsulti la vortaron" – ja, kiom ajn *relative facila* estas nia lingvo, tamen ĝi ne povas suplemente prezenti „funelon, per kiu oni povas facile enigi scion en la cerbon."

Al tiu afero apartenas ankaŭ flankafereto, ne seninteresa: al la Novzelanda diskuto alparolis anglalingva *Usonano,* la admirinde fervora kaj diligenta Bernard *Golden* – el *Hungario* (tie li delonge loĝas), kie cetere la polemiko ne havas grundon, pro la specifeco de la hungara lingvo; kaj lian artikolon transmare aprobas *hungaro,* kiu vivas en anglalingva Novzelando (por lasi senmencie liajn jardekojn pasigitajn en *Japanio*). Nu, Esperanto kompreneble internaciigas kaj kvazaŭ likvidas la terajn distancojn. Kaj fine: Major proponas al siaj anglalingvaj samlandanoj (samideanoj) – relegi la poldevenan Faraonon. Eventuale vi plifaciligos tion per bildromano. Eblas, sed ne samas.

Mi devas daŭrigi la temon (ne la diskuton) ĉe la menciita hungara specifeco, tamen sen la intenco tedi iun per lingvistikaj aventuroj. Tra Radio *Vieno* prelegis ĝia Esperanto-redaktoro, prof. Karl *Beckmann* tutan serion pri karakterizoj de la hungara lingvo; kaj li en tre interesa maniero reliefigis la – laŭ li – esceptan akuzativemon de la „hungaroj", kio ne nur per la akuzativa finaĵo, sed en la strukturo de mia lingvo multrilate prezentas sin. Ili donas – klarigis la profesoro – preskaŭ plezuron kaj deziron por la hungaro uzi abunde la akuzativon, ĉar li facile regas tiun lingvan fenomenon – kiu cetere tiom paliĝis en la Hindo-Eŭropaj lingvoj depost la latino, kie ĝi havis ankoraŭ fortan pozicion. Estis ne ĉiutaga prelegserio en Eo pri nacia lingvo – kaj feliĉe, ĝi estas ankaŭ skribe akirebla de la afabla Viena E-Redakcio, bonvolu utiligi tiun eblon.

Dum la Scienca-Teknika Konferenco en Žilina (Slovakio) vekis eksterordinaran intereson la E-lingva parolo de *komputilo*. Pri la problemoj, kiujn kaŭzis tu sintezo de Ea parolado, ni legis ekscite interesan artikolon en KONTAKTO de la „sintezisto", la Usonano Bruce Arne *Sherwood* (Ŝervud). Dio li, kiu sukcese instruis al la maŝino laŭtlegi tajpitajn E-ajn (kaj alilingvan) tekstojn, mi citas unu konkludon: „eĉ se Eo ne havas ideale simplan prononcon pri kelkaj niaj miksitaj sonoj: ĝ, ĵ... *E.F.*), la sonsistemo notinde pli simplas ol tiuj de la plejparto de la naciaj lingvoj."

El la ofte publikan eĥon akirintaj klerigaj artikoloj de KULTURAJ KAJEROJ petas mencion tiu, tute ne freŝiga, eĉ maltrankviliga raporto, kiu skribas pri la sin toksigaj kondutoj – de best̂j. Ne nur homojn oni renkontas do kiuj toksiĝas per alkoholo, tabako (ĉefe!), per opio, haŝiŝo, LSD kaj aliaj drogoj. En plej diversaj lokoj de la Tero ebriiĝas per multaj manieroj vertebruloj kaj senvertebruloj el tiuj „malpermesitaj fruktoj" de la vegetado. Ĉimpanzoj fumas cigaredon aŭ pipon – skribas la aŭtoro sen ironio – kelkfoje kun homaj mienoj. Dum vojaĝo cetere mi vidis *homojn* – ne ofendu la bravajn ĉimpanzojn! – kiuj enspiris drogojn kun mienoj de... (Solvo de la enigmo ne estas sendinda al la redakcio.)

FRANCA ESPERANTISTO prezentis novan kampanjon: La Klubo de la Jarcento. „Klubo 87" kreiĝis dum E-kongreso en Perpignan, kiu portas jam en la nomo sian argumenton por akcele varbi kaj vaste progresigi la movadon. Konkreta, plaĉa, adaptema agadprogramo movos la partizanojn de la IL en Francio, kie ili multnombre troviĝas – aŭ devas troviĝi – laŭ la esploroj. Probable simile estas en multaj aliaj landoj. Oni devas „nur" per lertaj, aktualaj ekagoj altiri ilin al taŭgaj aferoj. Tiuj povas esti la plej diversaj, kiaj nur estas imageblaj. Simila agemo legeblas en sveda LA ESPERO, kies pli kaj pli lerta redaktado igas la revuon pli kaj pli leginda.

La alproksimiĝo al la ne-esperantista publiko pere de nacilingvaj, direktitaj artikoloj komencas okupi pli ampleksan lokon tra la revuoj. Ŝajnas al mi, ke la hungarlingva MONDO KAJ LINGVO ne restos daŭre la sola porpublika propaganda revuo. ELNA NEWSLETTER en Usono faras ankaŭ sian taskon per bone elektitaj anglaj artikoloj pri la dezirinda solvo, jen kaj jen spicante per E-aj poemoj (Baghy) kaj informoj, por fari guston.

Ervin *Fenyvesi*



Flosanta akvoelpumpejo sur Tiso

La irigacio: evoluiganto de la agrokulturo

D-ro Ferenc László

Estas bone konate, ke la agrikulturon, precipe la kultivadon de vegetaĵoj eksterordinare influas la cirkonstancoj en la naturo: la klimato kaj la grundo. Ĉe ambaŭ havas gravegan rolon la akvo, tiu baza elemento de plantoj, sekve grava faktoro de la kultivado. La akvokvanto de la grundo, la rilatoj inter akvo kaj grundo havas decidan signifon por la kultivado.

Tion daŭrigante, oni facile konscias, ke la malsekaĵo de la grundo nature devenas de pluvo kaj neĝo, tamen, multloke sur la Tero tiuj ne kapablas certigi por la grundo la loketempe bezonatan akvokvanton. La mankantan akvon arte kompletigi, tio estas la tasko de irigacio. Irigacio estis ĉiam – kaj estonte pli kaj pli estos – grava rimedo de la agrikulturo, do tial ankaŭ por la nutrado de la homaro.

Irigacio en la antikvaj tempoj

La homoj jam antaŭ multaj jarmiloj ekkonis la grandajn eblecojn de la irigacio. Pri tio sufiĉe atestas la altaj kulturoj de antikvaj landoj. La grekoj ekzemple glorigis inter la sep mondmirakloj la „pendantajn ĝardenojn" de *Semiramis*. Tiuj lukaj ĝardenoj, planitaj kun eksterordinaraj zorgo kaj fakscio, situis sur ornamformitaj ŝtonterasoj, kie probable tropikaj plantoj kaj pompaj floroj paradis La sekreto de la miraklo troviĝis en la irigacio: levaparatoj kondukis l burĝonigan akvon sur la altajn terason.

La Babilona reĝino Semiramis devenis el Asirio; tie, en la malvastiĝanta valo de la supra Tigrisola Asiraj terkulturistoj delonge konis a manieron krei sur deklivoj pendantajn ĝardenojn, kaj sciis, kiel konduki la akvon de fontoj kaj fluoj sur a agrojn. Reĝo *Senaĥerib* jam ĉ. 700 .K. konstruigis pendantajn ĝardenojnsur preskaŭ 3 hektaroj: por la floredoj oni hakis ujojn el la rokoj, kien ta kavaĵo fluis la akvo.

De *Herodoto* estas konae, ke la bela Semiramis konstruigis sr la Babilona ebenaĵo „admirindaj digojn, kie pli frue la rivero fojfce transformis la landon je senfin maro." Post kvin generacioj alia reino, *Nikotris* regis en Babilono, pi kiu la greka historiisto skribis: „Graddistance super la urbo Babilono, aj proksime al la rivero, ŝi igis fosi ujon por lago, tiel profundan, ke la grundakvo jam aperis en ĝi. Ties perimetra longo atingis 420 stadiojn. La elfositan teron oni utiligis por konstrui digojn preter la rivero." La 420 stadioj egalas al ĉ. 70 km! Herodoto aldonas, ke dum la konstruado de tiu grandega lago oni utiligis ankaŭ forton de la fluo.

En la lando de la du riveregoj – Mezopotamio, t.e. Interriverejo – malmulte pluvas. Eŭfrato kaj Tigriso portas la akvon de montoj el la fora Armenio. Sed tiu akvo ne alvenas laŭ egala abundeco. Printempe ĝi fluegas per detrua forto, sed somerfine kaj aŭtune ĝi apenaŭ fluetas. Do, la lago, menciita de Herodoto, estas konsiderinda kiel akvorezervujo: dum altakvo ĝi akceptis parton de l' akvo, kaj rezervis ĝin por la seka periodo. La riveron digoj bremsis, do ĉe altakvo la fluejo povis disvastiĝi inter ili. Multege da rektliniaj kanaloj kondukis la akvon al la ebenaĵo, kie flankkanaloj kaj fosaĵoj direktis ĝin al la agroj. Dum abundis akvo, la lando estis fekunda...



Ŝveliga digo ĉe Kőrösladány

Antaŭ preskaŭ tri mil jaroj floris la pendantaj ĝardenoj de Semiramis, sed la unuaj spuroj de l' irigacio estas du- aŭ trioble pli fruaj, kaj ili vibras al ni el tiaj antikvaj tempoj, pri kiuj certaj informoj jam malaperis. Antaŭ la homa invado, la lando de la du riveroj estis sovaĝa, marĉoplena regiono. Arkeologoj sukcesis konstati, ke la plej antikvaj loĝlokoj situis ĉie sur homfaritaj teramasoj. Jarmiloj pasis ĝis la homoj sukcesis sekigi la marĉojn kaj transformi ilin je fekunda tero. Sed oni devis tiujn akvumi, ĉar fermitaj disde la akvoj ĝuste dum la produktanta periodo de la plantoj, pro sekeco tiuj pereus. Tiel kaj tial kreiĝis laŭgrade digoj, kanaloj, fosaĵoj, artefaritaj montetoj por loĝado. La kanalreton oni devis provizi en precize fiksitaj tempoj per determinita akvokvanto. Tiu tasko superis la forton de unuopaj gentoj aŭ komunumoj, kaj postulis pli altgrandan socian organizon.

Tiel kondukis la irigacio al la civilizacio. Inter Eŭfrato kaj Tigriso – kaj kelkloke alie – la arta irigacio prezentis la bazon por tia agrikulturo, de kiu devenis la unuaj altnivelaj homaj kulturoj.

La irigacio imperative postulas tutlande unuecan reguligon, ĉar nur tiamaniere eblas krei ekvilibron inter akva abundo kaj manko, nur tiel eblas kontentigi ĉiujn akvopostulojn kaj la antagonismajn pretendojn. La egajn laborojn, bezonatajn de la publika intereso, oni plenumis sub reĝa direktado: statuoj de tiuj reĝoj klare prezentas ilin kiel „inĝenierojn kaj direktorojn" de tiuj ŝtataj entreprenoj.

La kaptitajn malamikajn soldatojn oni devigis sklave labori: ili konstruis novajn digojn kaj kanalojn, protektis tiujn kontraŭ sabla ŝtopiĝo aŭ fendiĝo. Kompreneble la strategio ofte direktiĝis por detrui la kanalojn de la malamiko, kiu siaflanke tutforte defendis tiujn. Ĉio ĉi necesigis absolutan reĝan potencon.

Antaŭ ses mil jaroj jam ekzistis la unuaj urboj en la valo de Tigriso kaj Eŭfrato: Uruk, Ur, Larsa, Adap estis ekonomiaj fokusoj de malgrandaj ŝtatoj. La reĝaj tomboj de urbo *Ur* – la plej antikvaj de la nun konataj – ĝuste tial postrestis sendifekte, ĉar la regionon oni antaŭe senakvigis per subteraj, truhavaj argiltuboj.

El la urbaj civitoj disvolviĝis la Sumera kaj Akada regnoj. Post 2230 a.K. nomadaj montaranoj (Guti-oj) invadis la landon kaj okupis ĝin. Tiu barbara tribo kompreneble nenion sciis pri la irigacio, kiu estas tro facile damaĝebla de ĉia misago. Ne mirinde do, ke la Sumeroj tiel malespere plendis al dio Ninurta:

Nia lando falis en manojn de kruelaj,
Malamikoj forkaptis la diojn.
Impostoj, pagendoj premas la popolon,
Detruitaj jam niaj kanaloj, akvumiloj.
Ne eblas ŝipi jam sur Tigris',
Nek ricevas akvon niaj kampoj,
Nek donas produkton niaj kampoj.

Finfine la urbo Ur sukcesis reakiri sian liberecon, kaj ankaŭ tiun de la aliaj civitoj. Poste Babilono gvidis la landojn al nova florado. En la 18a jarcento a.K. reĝo *Hamurabo* prenis la regpotencon super la tuta teritorio. Li konstruigis novan kanalon, kaj fiere skribigis pri tiu „Nar-Hamurabi" sur kolonon: *„Jen la riĉaĵo de la popolo, kiu portas akvo-abundon al Sumero kaj Akado. Ĉe ĝiaj bordoj iĝis produktaj la kampoj, la grenoj formas jam monton. La popolon de Sumer' kaj Akad' la kanal' per akvo provizas ade."*

Akvorezervujo ĉe Csórrét

Samkiel supre ni vidis, ankaŭ Hamurabo mem direktis la irigacion. La oficistojn li igis respondecaj pri regula akvoprovizado en la tuta lando. La majstre preparita sistemo preskribis ĉies devojn, de supre ĝis la vilaĝ-komunumoj kaj terluantoj. La akvo signifis vivon. Kiu rompis la leĝojn de la akvodistribuo, pagis per sia vivo aŭ per sklaveco pro sia krimo. Dum la akvo atingis la agrojn, la lando floris kaj riĉiĝis. Urboj fondiĝis, grandiozaj preĝejoj kaj artaĵoj manifestis la eksterordinaran prosperon de la lando. Ne estis hazarde, ke tie kreiĝis la legendo pri *Edeno,* mirinda ĝardeno de belegaj fruktarboj.

La inaŭguro de la scienco strikte ligiĝas al la irigacio Mezopotamia. La vastecon de la irigaciataj agroj necesis precize mezuri, ja laŭ tio oni pagis imposton kaj luprezon. Mem la konstruado de digoj kaj kanaloj postulis – kaj tial disvolvis – profundajn geometriajn konojn. La akvo-distribuo devis okazi en konvenaj tagoj, kio necesigis iel difini la tagojn de la jaro, prefere helpe de la stelaj pozicioj: alivorte, oni alvenis al kreado de kalendaro.

Ankaŭ aliaj landoj povas fieri pri antikva irigacio. Estas konate, ke la Ĉina imperio fondiĝis preter *Hoanho,* nomata ankaŭ Flava-rivero, ĉar ĝia akvo kunportas dum inundo neimageblan kvantegon de leŭso kaj argilo. Ankaŭ en Ĉinujo la hidrotekniko multe antaŭis la skribitan historion: la prospero de Ĉinujo komenciĝis siatempe ankaŭ pere de la irigacio. La florado de la ĉina kulturo koincidis kun la florado de la hidrotekniko. Kiam la ŝtato, kiu direktis la porpublikajn laborojn, disfalis (pro atakoj de la nomadaj Mongoloj, alitempe pro interlukto de multaj princoj), la kanaloj ŝlimiĝis, la fosaĵoj enfalis, kaj ekregis la landon kruela malsato. Sed la kamparanoj ĉiam ree ekfunkciigis la kanalreton por konduki la akvon de Hoanho, *Janceo* kaj ties flankriveroj sur la rizkampojn. Tiel restis Ĉinujo daŭre la lando de la plej vastarea irigacio.

En la valoj de *Induso* kaj *Gangeso* same jam de pratempoj la tero estas irigaciata. Tiu areo en Hindujo apenaŭ estis pli malgranda ol en la antikva Ĉinujo, kaj ĉiutempe estis konstruitaj multaj miloj da ŝveligaj digoj, valbaraĵoj kaj grandaj kanaloj. En la opaj provincoj ege diversas la kvanto de pluvo; dum la jaro ĝi varias inter 125 kaj 6800 mm! Al la grandegaj geografiaj diversecoj akomodiĝas la lokaj irigaciaj manieroj: terasoj sur krutaj deklivoj kaj vastaj ebenaĵoj same troviĝas inter la akvumitaj areoj.

Jen, la rapide listigitaj unuaj altaj kulturoj kreiĝis senescepte en valoj de riveregoj. Sed ankaŭ aliaj landoj prosperis surbaze de irigacio. Meze de la 2a jarmilo a.K. fondiĝis la ŝtato *Urartu* sur altaĵoj de la nuna Armenio. La reĝoj konstruigis imponajn kanalojn, kies bordojn oni firmigis per ŝtonaj muroj. Ĉirkaŭ la Lago *Van* troviĝis iam la centro de tiu malaperinta ŝtato, kaj tie arkeologoj abunde trovas iamajn akvorezervujojn, akvumilojn, restaĵojn de kanaloj.

Antaŭ apenaŭ kvarcent jaroj estis detruita la imperio de la Inkaoj, unu el la ŝtatoj (apud la Azteka kaj Majaa) kiujn kreis indianoj. Ankaŭ la imperio de Inkaoj – cetere samnivela al la antikvaj orientaj imperioj – prosperis surbaze de la irigacio, kies kanalsistemo grandegajn areojn ŝanĝis je abunde produktaj kampoj. En Peruo,



Pump-stacio de la Kanalo Danubvala

kie tre malmulte pluvas, la sama teritorio nun estas dezerta, preskaŭ neloĝebla.

Pro malmulto da agroj inter la montaraj altaĵoj de Andoj, ĉiu terpeco kaj akvoguto estis valora. Jam supre de la montoj oni kaptis la fontakvojn kaj kondukis ilin en kanalojn kaj rezervujojn. Tiuj estis konstruitaj el egaj rokpecoj, tre precize alĝustigitaj, por eĉ guton ne perdi tra la breĉoj. Sur krutaj montdeklivoj oni preparis terasojn, al kiuj sur rokaj kavaĵoj oni kondukis la akvon; la humon oni suprenportis el la valo... Kelkaj terasoj estis tre etaj, eble nur por 5-6 maizo-tigoj.

Mem la Inkao, la alta reganto direktis la irigacion. En *Kuzko* kiel solena imperiestro li promenis al la kampo de Sundio, tiel donante signon por komenci la laborojn sur la agroj. Inkao *Virakoĉa* ekzemple igis fosi plurcent kilometrojn longan kaj tre profundan kanalon, por ekkulturi la senproduktan bordregionon. La tekniko de l' indianoj estis malperfekta, tirbestojn ili ne havis – probable grandaj aroj da kamparanoj kaj sklavoj estis bezonataj por plenumi la ege malfacilan laboron de montara kanalkonstruado.

La ĉinoj havis leŭsajn agrojn, Nilo kaj Eŭfrato mem alportis la produktivan ŝlimon, sed la lando de Inkaoj nepre bezonis sterkon. Nu, tio troviĝis sur insuloj ĉe la marbordo, ĉar tie vivas nenombreblaj aroj da birdoj, kies guano amasiĝas plurajn metrojn dike. La indianoj kun granda zorgo utiligis tiun sterkon. Sed venis la oravidaj, rabemaj hispanoj, kiuj subjugis Peruon, per fajro kaj glavo neniigis la Inkaan kulturon. Restis nur kelkaj ruinoj, sensignifaj priskriboj pri la pereinta ŝtato. La praarbaro etendis sin super la kanaloj aŭ sablo de dunoj kovris iliajn restaĵojn.

La irigacio hodiaŭ kaj venonte

Laŭ vasteco de la akvumitaj areoj elstaras Ĉinujo, Hindujo, Usono, Sovetio kaj Pakistano. En dudek aliaj landoj oni akvumas pli ol unu milionon da hektaroj. Dekdu landoj irigacias almenaŭ duonmilionon da hektaroj; tiuj 37 landoj partoprenas per 88% el la tuta irigaciejo sur nia Tero.

En Eŭropo jam ne troviĝas lando sen ia irigacio, eĉ ne en la nordaj landoj. Cetere Italio staras antaŭe, de ĝiaj agroj 29 procentojn oni akvumas.

Nuntempe la pli granda parto de la Tera loĝantaro nutras sin el produktaĵoj de irigaciataj agroj. 7000 jarojn post komenco de la Mezopotamia irigacio, tiu rimedo iĝis eble la plej grava faktoro por nutri la homaron. Ĉie en la mondo konstruiĝas novaj irigaciaj sistemoj, kiuj disvastiĝas ankaŭ en landoj, kie ĝis nun ili ne estis uzataj.

Por skizi la futuron, ni ekiru el la nutrad-problemo de la homaro. Laŭ taksoj la Tera loĝantaro de la nunaj 4 miliardoj kreskos ĝis j. 2000 super 6 miliardoj. Kondiĉe, ke ĉiu konsumos laŭ la nunaj kvantoj, la nutraĵprodukton oni devus levi je 1,5-oblo de la nuna produkto. Sed, kiel konate, granda parto de la homaro nuntempe ne nutras sin sufiĉe (el tri homoj nun du pli-malpli malsatas!), do oni devas venki ankaŭ la Teran malsaton. Tio necesigas *triobligi* la nutraĵprodukton de la mondo: abunde troviĝas ankoraŭ tiucele ebloj en la produktado, kaj tian eblon prezentas unuavice la irigacio!

La monda situacio montras por la fakuloj, ke abunde troviĝas pliaj ebloj, rilate kaj la areojn, kaj la uzeblan akvokvanton. La disvolvo etendigos la akvumitajn areojn, kaj pli efike utiligos



Rezervujo por irigacia reto (Tarcal)

la irigacion apud la akvoj; oni pl. multigos la akvokvantojn, ankaŭ per ŝparema utiligo, kaj elektos pli ekonomie, pli science la irigaciajn metodojn, inter aliaj per drenado de l' areoj kaj per grava perfektigo de la irigacia tekniko, per aŭtomatigo. Plifortiĝos la duobla rolo de la irigacio: kreskigo de la produkto kaj pliigo de la produkta sekureco.

La irigacio en Hungarlando

En la 16a jarcento oni komencis en Hungario la kultivadon de rizo, kaj de tiam oni irigaciis en la lando. Antaŭ 300 jaroj la turka *Evlia Ĉelebi* vivis tie ĉi kaj skribis pri grandaj irigaciaj kanaloj; antaŭ la turka epoko oni jam utiligis i.a. la montajn riveretojn. Ties akvon printempe oni alkondukis al la kampoj, kaj post kiam tiuj ricevis la sedimentan ŝlimon, la fluon oni reordigis. Fidindaj indikoj mencias, ke dum la turka epoko ĉirkaŭ urbo *Eger,* kaj ankaŭ en Transdanubio, post la turkoj en sud-orientaj regionoj disvastiĝis rizplantejoj. Pro tro ofte okazintaj sekveteraj jaroj en la 18a jc. oni komencis la irigacion de herbejoj kaj paŝtejoj, precipe post 1820.

Post katastrofa seka sezono de 1863 la publiko forte postulis irigacion en la Granda Ebenaĵo. Rapide estis faritaj interesaj projektoj pri irigacia kanalo de Tiso tra la stepo de Hortobágy, kaj similaj, ekzemple inter la supra Tiso kaj Körös-riveroj, inter Gyula kaj Békéscsaba. La neceso urĝigis precipe en Tiso-regiono, en regiono de Hortobágy, pro la ripetiĝantaj katastrofaj sekveteroj – kaj tiu cirkonstanco favore maturigis la aferon.

Kio tamen malhelpis la aferon en sekaj regionoj de la Granda Ebenaĵo, tio estis la profundeco de la riveraj fluejoj, pro kio la irigacian akvon suprenlevi necesis multekostaj pumpilejoj aŭ ŝveligaj digoj kun grandmezura kanalaro. Malgraŭ ĉio, en 1879 jam sur dekmilo da hektaroj okazis irigacio. Helpis baldaŭ la leĝo pri akvojuro; ĝis 1918 oni movis da tero ĉ. 3,8 milionojn m^3 por pliajn 15 mil hektarojn akvumi.

La evoluo daŭris en konvena ritmo ĝis la Unua Mondmilito. Post la milito la teritoriaj ŝanĝoj kaj la ekonomia malprospero reduktigis la akvumitajn areojn. Nur post la leĝo pri irigacio en 1937 ekrapidis la afero, sed ĝin ĉesigis la Dua Mondmilito. Post la liberiĝo de sub la reakcia reĝimo, la afero antaŭpaŝis, helpe de la planekonomio, kaj la irigaciaj sistemoj ekkonstruiĝis rapide kaj vaste.

Signife vastiĝis la rizplantejoj kaj aliaj akvumitaj bienoj. En 1955 jam efektive funkciis irigacio sur 91 mil hektaroj. Poste oni laŭplane reduktis la rizplantejojn, sed ĝenerale perfektigis la teknikajn rimedojn, do la kvaliton de la irigacio. Baldaŭ, post la socialisma reorganizado de la agrikulturo, pere de la grandaj kooperativaj bienoj firmiĝis ankaŭ la sociaj kondiĉoj por la nova evoluigo.

La klimato de la Granda Ebenaĵo ebligas kulturi multajn specojn eĉ sen irigacio. Sed 70-80 procentoj de la jaroj estas sekaj, 20-30 procentoj eĉ tro sekaj, kaj tiam la manko de pluvo kaŭzas gravajn damaĝojn. Se oni irigacias, tiam *eblas*



Herbeja irigacio per pluvigiloj (aspergado)

– sendependigi de la vetero la agroprodukton,
– altigi la produktokapablon de la agroj,
– kulturi tiajn vegetaĵojn, kiuj cetere, sen akvumigo ne estas en la lando produkteblaj.

Estas rimarkinda la akceliĝo ĉe la rizkultivado post la milito. La tiutempe instalitaj irigaciaj sistemoj ĉe Tiso preskaŭ senescepte servis la rizproduktadon. Ties kaŭzoj estis klaraj: la granda nombro de la sunplenaj horoj kaj la grundo speciale favoras la rizkultivadon. Jam en la unua jaro ĝi montriĝis profitdona por la entreprenoj, ankaŭ rilate la eksporton. Kelkloke tiu ĉi branĉo estis, kiu inaŭguris la irigacian mastrumadon. Bedaŭrinde dum la unua jardeko en la rizplantejoj oni ne kulturis aliajn vegetaĵojn, do ne akiris tiurilate spertojn.

Nun montriĝas forta evoluo rilate la *pluvmanieran irigacion* (aspergado), kaj atendeble ĝi venonte eĉ kreskos. La porteblaj pluvigaj aparatoj ekde 1958 teknike moderniĝis kaj akcelis la uzon de tiu metodo. La disvastiĝon bone montras, ke tia pluvigado estis uzata en 1960 sur 25 mil ha, en 1962 sur 117 mil ha, sed en 1964 jam sur 244 mil hektaroj. Forte akcelis tion la socialisma transformado de la agrikulturo, la firmiĝo de la socialismaj grandaj bienoj.

Provizore malhelpis la rizproduktadon, ke industri-tipa produkta metodo ankoraŭ ne ekzistis: sed forte evoluis la akvumita produktado de legomoj, ankaŭ de la fruktoj, kaj same la akvumitaj paŝtejoj por brutoj. La plej granda kresko okazis ĉe plugkampoj (furaĝplantoj, maizo ktp.); ĝi konsistigis du trionojn de la tuta irigaciita areo, kiu atingis en 1968 jam 365 mil hektarojn. Apud la granda salto ĉe la pluvigado, la surfaca irigacio okupis 68 procentojn el la tuto.

Inter la multaj irigaciaj instalaĵoj la plej granda kaj moderna estas la *Akvonodo de Tiszalök* kun la Orienta kaj Okcidenta ĉefkanaloj. Ŝveligo, centralo kaj ŝipkluzo funkcias tie depost 1954. Per ĝia realigo taŭge ekmarŝis irigaciado en la Granda Ebenaĵo. Kune 55 m^3/s akvon liveras la du ĉefkanaloj, ebligante sur 120 mil hektaroj la irigacion.

Kiel rezulto de la sistema disvolvo, en j. 1978 la irigacio uziĝis sur 486 mil hektaroj – kompare kun la 16 mil hektaroj de 1945, do tre signife ĝi antaŭmarŝis. Nuntempe 800 grandaj bienoj utiligas irigacion, kaj memkompreneble, ili sur tiaj areoj produktas vere pli ol en siaj tn. seke mastrumitaj areoj.

Estas ankoraŭ multaj farendaĵoj por maksimume utiligi la eblojn de irigacio. La akvobezono, la proporcioj de la konvenaj vegetaĵoj ankoraŭ ne sufiĉas, same la altvaloraj plantejoj nur malmulte partoprenas. Multloke postrestas la irigacio ĉe la herbejoj. Estas necese, ke en la nuna kvinjara plano (1981–1985) la enlandan konsumon de terpomoj kaj sukeroj jam plejparte la irigaciaj areoj kontentigu. Tio rilatas ankaŭ la disvolvon de la legomprodukto, ĝin devos forte antaŭenpuŝi la kreskonta irigacio. Estas atendeble, ke tiuj ekonomiaj celoj sukcese realiĝos pere de la pliampleksigita irigacio. Tio estos favora, kaj por la enlanda loĝantaro, kaj por pli granda aro da eksterlandaj konsumantoj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Murmureto inter muregoj

Ervin Fenyvesi

Kapelo de hotelo

La „sekretojn" de multaj antikvaj domoj en la Burg-kvartalo de Buda – kiel mi menciis en la antaŭa artikolo – „malkovris" la ruinigoj de la vintra sieĝo de 1944/45. Lavange falis morteroj kaj muroj, kiuj kaŝis la pli frue konstruitajn partojn, ofte pli valorajn, almenaŭ pli interesajn ol estis la poste faritaj arkitekturaj transformoj. Troviĝis ekzemple domo, kies kelo-fundamento pruviĝis deveni el la 14a jarcento, kaj la sidniĉoj en la enirejo el la 15a jarcento; restis grundmuro el la 16a jarcento, sed la keloplafono estas turkepoka, 17a jarcenta. Interne restis sendifekta baroka kuirejo el la 18a jarcento, sed la pordalojn oni enigis en la 19a jarcento. Kaj la grava ruinigo, kaj la nuna restaŭrado fare de arthistoristoj apartenas jam al la 20a jarcento...

La variajn turnojn de la historio, de la socia strukturo tra la tempo kurioze karakterizas la – preskaŭ hazarde – konata listo de posedantoj de novgotika loĝdomo (Uri utca 8.). Fine de la 14a jarcento ĝi apartenis al iu provinca kanonikaro, poste al Petro Rozgonyi, armilportisto de reĝo kaj imperiestro Sigismundo (de Luksemburgo). Sekvis la monaĥinoj Klarininaj, sed en 1510 jam la vidvino de Kanizsai, Kroatia guberniestro posedas la domon. La baldaŭ veninta turka okupo certe denove ŝanĝis la cirkonstancojn, tamen (ankoraŭ) ne estas bone konataj la tiamaj loĝantoj, nur la reokupon sekvanta mastro: Johann Kaspar Rupp, armea komisaro pri nutrado, kiu vendis ĝin al hotelisto, Johann Friedlein. Komence de la 19a jarcento la posedanto nomiĝas Josef Handl, perukfaristo, lin sekvis Eckmayer gubernia arĥivisto, poste Sándor Gellér tajloro – jen denove hungara nomo –, de kiu grafo Gyula Széchenyi, ministro, aĉetis tiun „pacienCan" domon fine de la 19a jarcento. Ĉu necesas mencii, ke la posedŝanĝojn ĉiam sekvis „modernigoj" laŭ tiutempaj bezonoj kaj stilpreferoj? La ŝtato faris denove loĝeblaj la loĝejojn, kiujn nun okupas kuiristo, helplaboristo, skulptisto, komercisto, por nur kelkajn mencii.

En centro de la Burgo magnete altiras la vizitantojn la katedralo: antaŭ cent jaroj formis ĝin *tia* el multe pli simpla preĝejo la tiama allogo al historiaj stilartoj. Formiĝis do la puntornama, troplektita-brodita novgotika *katedralo Matiaso,* kiu almenaŭ forigis la gipsajn kaj marmorajn, stilrompajn barok-ornamaĵojn el la 18a jarcento. Flanke de ĝi, la ŝtaton fondinta reĝo *Stefano* alrigardas desur ĉevalo, vere, la kristana preĝejo esence estiĝis pro lia granda verko: la kristanigo ĝuste antaŭ mil jaroj. Efikplena impresas la katedralo, precipe kun la malantaŭa FiŝistaBastiono: ne disputeble eminente aranĝita – kvankam iomete mistifikas la historian iluzion, kiu estas pli teatra ol historie prava. Sed eblas eĉ tiel ĝui kaj plezuri.

Jes, jes... la *Bastiono de Fiŝistoj,* ĉiu scias, neniam servis por defendi la Burgon: ĝiaj terasoj, kiel grandaj ŝtupoj por ĝui la grandiozan panoramon al Danubo kaj urbego, por promenadi de ravitaj amasoj, naskiĝis bonfantazie el romantika arkitekta revo en la pasinta jarcento. Eble fabelajn filmojn desegnantoj dekoracius por tia ĉirkaŭaĵo eĉ nuntempe similan kulison, novromanik-stilan, ŝtonĉizitan, kiel decas al kastelo de feoj. Kvazaŭ blazono de la Burgo, eĉ de Budapeŝto, ĝi neeviteble situas en fokuso de ĉiuj fotiloj, memore de la Hungarlandaj vizitoj. Kiel tra falsa ŝlosiltruo, videblas tra la senfenestraj aperturoj de l' turoj la panorama spektaklo de la metropolo.

Mi aludis al historia iluzio. Pro grimaco de l' epoko, tamen eĉ tiu fariĝis *vera* historio. Ĉu strange? Jes; sed sur la koridoroj de la Bastiono, kie nun vi promenas, komence de 1945 klakadis maŝinpafiloj, en la turetoj amasiĝis kadavroj, kaj la apenaŭ duonjarcentan terason disrompis grenad-eksplodoj inter la ĉirkaŭfermitaj Hitleraj trupoj, ĝis ilia baldaŭa kapitulaco. En la profundo staras ankoraŭ partoj de la fortikaj grundmuroj, kiujn konstruigis la sinsekvaj turkaj paŝaoj sur restoj de pli frua *vera* bastiono, kiun defendi devis iam – laŭdire – la gildo de fiŝistoj...

Novgotika loĝdomo (Uri utca 8.)

Tuj apud la katedralo staras (eblas diri ankaŭ ke pozas aŭ imponas) ega, iom kurioza konstruaĵo de la *Hotelo Hilton*: moderna – kaj mezepoka; reliefriĉe baroka – kaj vitroplene glata; en ties bronzeca spegulo rigardas sin surprizite la gotikaj volboj kaj trifolioj. La malhela hotelbloko superas kaj regas sur la Burga altaĵo, kun prema maso geometria kvazaŭ ĝi mastras la preĝejon de Matiaso, kaj zonas sian ventron per la punta FiŝistaBastiono... Ironie malicas la malrespektemaj Burganoj: „ĉu tiu preĝejo antaŭ la Bastiono? Vidu: *jen la kapel' de l' hotel'...*"

Iam por la reĝoj ĝi servis vere kiel „palaca kapelo", kie la unua estis kronita en 1308: li venis el Napolo, la Anĵua Karlo-Roberto, kaj la kronsurmetoj daŭris ĝis la lasta, la Habsburga reĝo, en 1916, du jarojn antaŭ la fiaska disfalo de anakronisma imperio. Sub arko de tiuj ses jarcentoj ankaŭ la Bizanca imperiestro pilgrimis tien ĉi (apud Sigismundo en kies nomo oni sendis sur ŝtiparon majstron *Hus*), kaj post nelonge pereis Bizanco... Post morto de reĝo Matiaso, filo de la turkojn venkanta granda armeestro Johano *Hunyadi*, la kruela minaco de turka invado igis konduki tiajn pro-

Rajda statuo de reĝo Stefano



La katedralo Matiaso kaj Hotelo Hilton de sur la Bastiono de Fiŝistoj

cesiojn: „Laŭ iu aŭguro, la mahometana religio neniiĝos – *skribis itala ambasadoro* – se neniiĝos la ĉerko de Mahometo. Pro tiu superstiĉo oni faris el papero kaj ligno moskeon, en ĝi ĉerkon kaj pupojn de sultano kaj paŝaoj. Kiam Lia Reĝa Moŝto atingis tiun moskeon, oni ĵetis fajron sur la ĉerkon, kiu ekflamis kun la turkaj pupoj. Dum ili brulis, ega amaso de hungaroj alkuris por frakasi per bastonoj kaj ŝtonoj ĉiujn. Estis vera plezuro rigardi tiun atakon."

Surloke de la Hotelo Hilton dum la mezepoko staris dominikana monaĥejo, probable „kulturcentro" de francoj kaj italoj en Buda. Malgraŭ la ripetiĝintaj sieĝoj postrestis la turo, la sanktejo de la preĝejo, kiuj nun konsistigas parton, kvazaŭ de muzeo, en la komplekso de la hotelo. La malfrubaroka fasado rekonstruiĝis kaj ne malgracie ligiĝas kun la modernaj vitraj surfacoj. Kaj interne aliaj „antikvaĵoj": salonoj viciĝas kun titoloj de Matiaso, Beatrix (lia edzino), Anĵuo, Béla kaj aliaj, reĝoj kaj princoj. *Pallas Atena*, ĉe transa angulo de la placo, kvankam gardas honeste per lanco la grandan trafikon, rigardas trankvile, kun greka kvieto – ja ankaŭ ĝi estas nur fidela kopio de ŝirmata relikvo el la iama urbodomo...



Sándor Szalay (1896–1981)

Foriris unu post la alia Baghy, Szathmári, Kalocsay, Tárkony – iamaj aktivuloj de Budapeŝta Skolo. Nun sekvis ilin plia atestanto de la gloraj tempoj: fine de junio en sia 86-a jaro silente mortis Sándor Szalay, presisto kaj eldonisto.

Novaj esperantistoj apenaŭ konas lian nomon, eĉ, inter la malnovaj nur filologoj, bibliotekistoj, librokolektantoj. Dum sia longa vivo – el kiu sep jardekojn li pasigis kiel esperantisto – li neniam celis rikolti laŭrojn; laborante multege por Esperanto, tamen li ĉiam restis en la fono, faris sian servon kiel sennoma, simpla soldato de grava afero.

Li naskiĝis en la jaro 1896 en la provinca urbo Kaposvár, kaj tie li lernis presistan metion. En 1910 li konatiĝas kun Esperanto, sed la militaj kaj revoluciaj jaroj ne lasas lin por sin plene dediĉi al la afero. Li partoprenas la mondmiliton, poste sin anoncas en la Ruĝan Armeon. Estante maldekstrulo pro sia konvinkiĝo, li eĉ dum la blanka teroro (en 1919–1920) organizas Socialdemokratian Partion kaj gvidas Laboristan Kulturhejmon, kie ankaŭ Esperanto estas instruata.

En 1932 li sukcesas memstariĝi kiel presejposedanto kaj ekde tiam li produktis multe; lia entreprenemo, riskemo, oferemo multe kontribuis al ekfloro de Budapeŝta Skolo kaj ĝenerale al disvastigo de Esperanto. Li estas aktivulo de HESL, post ties ĉeso gvidanto de katolikaj esperantistoj.

Tri originalaj romanoj de Baghy – inter tiuj ankaŭ La Verda Koro, laŭ kiu eldono naskiĝis ok alilandaj represoj! –, lernolibro de Baghy kaj de Baranyai, propra koresponda kurso, hungarlingvaj propagandadiloj poresperantaj gardas lian nomon kiel eldoniston.



Paralele kun la poresperanta agado li ligis kaj dediĉis sin ĝenerale al progresemaj, patriotaj ideoj kaj movadoj.

Vivante en ravo de beletro eĉ li mem multe tradukis. Liaj poemtradukaĵoj aperis jam en la dudekaj jaroj en Verda Stelo de Teo Jung; lin kaŝas la pseŭdonimo Maŭro – tradukinto de Elektitaj Fabeloj de András Fáy, ankaŭ Hungara Vivo publikigis tradukaĵojn de li.

Li presis la revuojn Hungara Heroldo, Katolika Stelo, kaj eldonis siajn specialajn „Szalay-Cirkulerojn", kiuj dulingvaj eldonaĵoj samtempe informis esperantistojn pri movadaj aferoj kaj propagandis hungarlingve por Esperanto. Laŭ lia iniciato radikiĝis en la hungara lingvo mem la vorto *eszperantó* en nacia ortografio.

Dum la dua mondmilito li partoprenis kontraŭfaŝisman rezistan movadon, pro kio estis arestita. La liberiĝinta lando ne forgesis pri siaj patriotoj: li ricevis altan ŝtatan honorigon: medalon „Por libero de Hungario".

La hungara nacilingva gazetaro laŭmerite primemoris lin kiel patrioton kaj internaciiston, batalanton por progreso kaj kulturo. Estas ankaŭ nia devo gardi lian memoron.

M. *Fejes*

Verku por komencantoj!

Daŭra problemo de la internacia movado estas manko de interesa legaĵo por komencantoj, verkita per utiligo de ia leksika minimumo. Fidela tradukado de por-infanaj poemoj kaj fabeloj el naciaj lingvoj ne multe utilas, ja en ties tekstoj tre ofte aperas nomoj de raraj bestoj kaj vegetaĵoj – kaj eĉ spertaj esperantistoj devas konsulti vortaron por kompreni ilin.

Hungara Esperanto-Asocio decidis iniciati redaktadon de „Baza legolibro por komencantoj", kiu verkiĝu utiligante nur la vortojn de la unuaj tri, respektive kvin grupoj de Baza Oficiala Radikaro. (Pri ĝi vidu en HV 1981, p. 7.)

La unuaj tri grupoj enhavas 401 elementojn – per ili oni verku historietojn en amplekso de 25-40 tajpitaj linioj. Tiaj tre simplaj historioj konsistigos la unuan sekcion de la legolibro.

En la dua sekcio aperos historietoj, kiuj ampleksas po 40-90 tajpitajn liniojn. Por la verkado de tiuj historietoj oni povos utiligi ĉiujn 706 elementojn de la unuaj kvin grupoj de Baza Oficiala Radikaro.

Tia verkado postulas grandan paciencon kaj inventemon; estas invitataj do ĉiuj verkemuloj, pedagogoj kunhelpi. Ĉe la Eldona Komisiono de HEA *(Budapest, Pk. 193, H–1368) oni povas peti la multobligitan liston de la uzeblaj vortoj; enkonduke de tiu listo oni trovos ankaŭ pli precizajn informojn pri detaloj.*

Oni rajtas konkursi per nelimigita nombro da historietoj, kiuj povas esti propraj verkoj, reverkaĵoj de verkoj de aliaj personoj, tradukoj (kompreneble mallongigitaj kaj simpligitaj) ktp. Gravas nur, ke ili estu interesaj, legindaj.

En tiu ĉi konkurso ne estos apartaj premioj. La plej sukcesaj historietoj presiĝos en „Baza legolibro por komencantoj", kiu aperos ĝis la fino de 1982. Oni notu, ke ideale la libro enhavos po 30 historietojn el ambaŭ tipoj, do entute 60. La aŭtoroj de la presitaj rakontoj ricevos po unu rakonto honorarie po 2 ekzemplerojn de la libro mem.

Oni notu, ke la listo de uzeblaj vortoj principe ne estas 'ampleksigebla. Se tamen – escepte – oni uzas eksterlistan vorton, necesas doni piednote ĝian signifon per la listigitaj vortoj.

Estas konsilinde eviti en la tekstoj uzadon de participoj, longaj frazoj, komplikaj strukturoj. Oni notu, ke tiuj tekstoj servos por personoj, kiuj tute malhavas legrutinon en Esperanto.

La manuskriptojn oni sendu en du ekzempleroj laŭeble (sed ne nepre) tajpite al la Eldona Komisiono de HEA, ĝis 1982–03–31.

Poeto Jiři Kořinek jubileas

Mi devas rememori tiun neordinaran tagon antaŭ tridek jaroj, kiam mi scivole foliumadis tra la unuaj poemoj de tiu pli sperta kaj ĉefe multe pli kapabla kolego, kiu kvankam malnova esperantisto, komencis krei verdire en la sama tempo kiel mi – post la jaro 1949. Mi rememoras, ke mi trovis inter ili verajn perlojn, tiajn perlojn, ke mi plurfoje diris al mi: Jen poeto!

Hodiaŭ Jiři Kořinek apartenas al la plej konataj literaturistoj de la Esperanta mondo: por liaj nepre ekstraj kvalitoj parolas eble plej konvinke la nombro de ricevitaj laŭroj – okaze de Belartaj Konkursoj de UEA kaj pluaj internaciaj eventoj li gajnis ĝis nun 18 premiojn por la originala kaj 3 premiojn por la tradukita poezio, el tio 5-foje la unuan.

Kun la nomo de Jiři Kořinek oni povis renkontiĝi sur paĝoj de diverslandaj gazetoj ekz. de *Norda Prismo, La Nica Literatura Revuo, Belarto, Paco, La Suda Stelo, Heroldo de Esperanto, Dia Regno, Fonto* kaj aliaj.

Memstara poemaro de Jiři Kořinek bedaŭrinde ne ekzistas. Parte kompensas ĝin la poemkolekto *Vitreroj*, kiun alportis la ĉeha revuo *Panoramo*, kaj kiu estis varme akceptita de liaj fidelaj favorantoj.

Prese aperis liaj tradukoj de Maminka (Panjo) de *Jaroslav Seifert* kaj Slezské pisné (Sileziaj kantoj) de *Petr Bezruč*, kiujn esperantigis tradukista triopo Hromada–Kořinek–Pumpr. Respektinda kvanto da poemoj de ĉeĥaj kaj slovakaj aŭtoroj (Brezina, Hrubin, Karen...) atendas publikigon. Multobligita estis la traduko de Manon Lescaut de *Vitězlav Nezval* (koncizigita versio de tiu ĉi poemdramo estis prezentita en 1968 okaze de Teatra Festivalo en Pula).

Por bezonoj de la kluboj en Brno kaj Usti nad Labem, Jiři Kořinek tradukis centojn da oper-arioj, duetoj, ĥoroj kaj klasikaj kantoj, kiuj estis prezentitaj de profesiaj kantistoj dum solenaj vesperoj. En manuskripto estas lia kompleta traduko de opero Jakobeno de *Antonin Dvořak* kaj Bibliaj kantoj de la sama komponisto.

Mi finas mian almenaŭ flugan rerigardon post la impona verkaro de Esperanta poeto, tradukisto, eseisto kaj senlaca aktivulo Jiři Kořinek, kiu 1. 10. 1981 ĝisvivis 75 jarojn. Multon mi eĉ ne menciis. Kial ankaŭ? Ni haltis ja nur por momento, nome por elkore gratuli al la kara jubilanto...

Eli *Urbanová*

Zamenhof al Schleyer

Letero de L. Zamenhof al Johann Martin Schleyer, elpensinto de mondlingvo Volapük

Varsovio, 07/XI 1887.

Estimata kaj estiminda sinjoro!

Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante la ridegon de l' amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon: kian mia laboro jam estis preta, mi kvar jarojn *devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado – ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.*

Kian mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük', mi ne forfetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük' ŝajnis al mi ne tute praktika; mi diris al mi, ke lingvo tutmonda devas esti antaŭ ĉio komprenebla, *kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis* internacia, *devas resti ne tuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutmonda, oni povas* krei *nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj; ĉio cetera devas resti* ne tuŝita. *Ĉar nenia persono estas tiel leĝdonanta por krei lingvon por la tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon da vortoj de lingvo, kun ĉiuj nomoj de l' landoj kaj urboj, kun ĉiuj sennombraj nomoj teĥnikaj etc.*

Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de Volapük', mi laboras ne kontraŭ *la Volapük', sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutmonda, kaj en kiu ajn formo l' homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi, ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo; se la juĝo de l' mondo estos ne decida, la „Lingvo internacia" restos kune kun la „Volapük', kiel du amikoj, kiuj havas* unu *celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos* du *lingvojn, kaj eĉ tio estos por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutmonda.*

Pardonu, ke mi skribas al Vi en mia lingvo: mi faras ĝin ne pro malĝentilo, sed por doni al Vi provon de mia lingvo.

Kun la plej granda estimo

Esperanto

Transskribis Adolf Holzhaus

Rimarko de Adolf Holzhaus. En la letero, en 8-a kaj 12-a linioj (en la manskribita letero 10-a kaj 15-a linioj) estas arkaikaj formoj kian kaj kian. Pri tiuj arkaikaj formoj esperantisto E. de Wahl atentigis Zamenhofon. L. Zamenhof korektis arkaikan formon. Pri tio Zamenhof parolas en la „Aldono al la Dua Libro de l' lingvo internacia", p. 5, 6, publikigita en 1888:
„La sola ŝanĝo, kiun mi trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian", „ĉian", „kian", „nenian", „tian" – devas esti: „iam", „ĉiam", „kiam", „neniam", „tiam" (por malegaligi la vortojn „ian" etc kaj „ian" etc)."

Lerniloj bezonataj en...

Laoso

K-do Waterinsak, Direction des pays socialistes, Ministére des Affaires étrangeres, VIENTIANE, LAOS (Asie) petas multajn internaciajn E-lernolibrojn (Esperanto 1, Premier Manuel, The Esperanto Teacher ktp.), E-aĵojn, E-informilojn en franca, angla, rusa kaj germana lingvoj.

Kampuĉio

K-do Navouth, v. ministre, Ministére de l' Education nationale, PHNOM-PENH, Republique populaire du Campuchea petas «Esperanta-Kamboĝa vortaro»-n de UEA, eldonitan en Budapeŝto, kaj francan, anglan, Esperantajn vortarojn, lernolibrojn (Esperanto 1), E-informilojn en franca, angla, rusa kaj germana lingvoj.

20-litra

KIRLILO

Tip: XH–20

KERIPAR

APLIKEBLA

En mezkapacitaj sukerajejoj, por prilaborado de diversaj materialoj (saumoj, kremoj, pastajoj).
Per la krommasinoj (apartenajoj) aligeblaj al tiu ci masino, estas plenumeblaj ankau aliaj laboroj (trancado, kacigo, muelado ktp.).

TEKNIKA PRISKRIBO

La bazo de la masino estas farita el veldita stallameno. Al la bazo estas fiksita la masinstablo, ankau el stallameno, sur la labora flanko de la masinstablo trovigas la kaldrontenilo kaj la sranko de movilo, en kiu trovigas la dentoradoj kaj aksoj, necesaj por tri rapidumoj. La trispecaj kirlostangoj krocigas al la cirkulanta akso per maniero, ebliganta rapidan fiksadon.
La kaldrono (20 l) per la kaldronleva stango estas laudezire levebla, kaj per du preniloj fiksebla al la kaldrontenilo.

KROMMASINOJ:

Muelilo de spicoj, papavo, viando, akrigilo kaj purigilo de tranciloj, kaj la krommasinoj (trancmasino, kacigilo, trancilo de kubetoj, fajlilo) KK-100-1/S.
Per aplikado de la masino eblas signife spari labortempon. La Estraro de la Sindikato de Laboruloj en Komerco, Financaj Institucioj kaj Restoracioj trovis la produktajojn de KERIPAR eminentaj el la vidpunkto de laborista sekureco.

PRODUKTAS:

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta Masinojn kaj Instalajojn por Komerco
H-1395 Budapest VI. Népköztársaság útja 43. Hungario
Departemento de Komerco: 313–124

Emil Kolozsvári-Grandpierre

Tio ne estas tipa, sed okazas

En oktobro, dum iu nuboplena antaŭtagmezo, ili kune paŝis en la lifton de la entrepreno. Unue ili preskaŭ ne rimarkis unu la alian, tiom absorbis ilin la „inteligenta lifto". Ses personoj veturas per ĝi, unu ĝis la naŭa, la dua ĝis la kvara, la tria ĝis la deka, la kvara ĝis la dua etaĝo, la kvina ĝis la kvina kaj la sesa ĝis la unua etaĝo. Ĉiuj premis la konvenan butonon kaj la maŝino mem prizorgis la vicordon. Estera laboris en la deka etaĝo, ŝi premis unua la butonon, tamen la lifto haltis unue ĉe la unua etaĝo, poste ĉe la dua kaj tiel plu.

Post la kvina etaĝo ili restis duope en la lifto. Estera veturis ĝis la deka kaj Ervino ĝis la naŭa etaĝo.

– Admirinda meĥanismo – ekvoĉis la junulo por ion diri.

La junulino akceptis la konstatafon per ia konsenta rideto.

Ervino volis diri laŭdon pri la direktoro, ĉar li modernigis la kontorkonstruafon de la Ĝenerala Malvarmigeja Entrepreno, li aĉetis tiun ĉi aŭtomatan lifton maloftan ankoraŭ en nia lando, sed la lifto tiel rapide kuregis, ke mankis tempo por tio.

– Ĉu vi ne eliĝas? – demandis Estera, kiam la lifto haltis ĉe la naŭa etaĝo.

– Pli poste... – gestis mane Ervino iome konfuzite.

– Ĉu vi laboras en tiu ĉi etaĝo? – li demandis, post kiam li elliftiĝis kune kun la junulino.

– Jam de kvar jaroj – respondis Estera.

– Mi en la naŭa.

– Ĉu vere? – demandis la junulino. – Kaj de kiam?

– Ankaŭ mi de kvar jaroj.

– Kaj tamen ni ne renkontiĝis ĝis nun eĉ unu fojon – diris Estera kaj emfaze ŝi surfrapis sian femuron kaj ŝi ekirus jam en sian ĉambron, se la junulo ne retenus ŝin.

– Restu ankoraŭ por momento.

La momento daŭris pli ol duona horo. Dum la duona horo Estera sciiĝis de Ervino, ke li trompiĝis, ĉar dum la militservo, lia fianĉino edziniĝis al veterinaro, kiu per Renault 16 vizitas la anemiajn bovidinojn, la naskontajn bovinojn kaj la senapetitajn porkojn. El la rakonto ŝi ĉerpis kuraĝon, konfesante, ke ŝi ne estas feliĉa, edziniĝinta viro amindumis al ŝi, li promesadis dum jaroj, ke li eksedziĝos, sed fine li rompis la interrilaton kun ŝi kaj ne kun sia edzino.

– Ĉu ni ne povus fari ĉi-vespere komunan programon? – demandis Ervino.

Jen, belaspektaj gejunuloj, plenaj de vivoforto, ambaŭ estas viktimoj, en ilia memoro la solece pasigitaj semajnfinoj, ankaŭ la nura, homa solidareco devigis ilin reciproke konsoli unu la alian. Posttagmeze ili rigardis italan filmon, el la tuta koro ili ridis, poste vespermanĝis rostitan kokidon en memserva restoracio.

Ĉe la adiaŭo ili interkisadis sur la Danubo-bordo, la nebulo bonfareme kaŝis ilin, la lumo de la lampoj dronis en la blanka kirliĝo, kiu tiel kovris la grandan riveron, ke eĉ unu brileto ne vidiĝis el ĝi.

– Ĉu ne ĝenas vin, ke mi estas tiel magra? – demandis Estera tiun tagon, kiam ŝi unuafoje faris viziton en la subluita ĉambro de sia kolego.

– Vi plaĉas al mi tia, kia vi estas. Cetere mi ĉiam abomenis remburitafojn promenantajn.

– Interese, mi neniam pensis, ke virino tiel magra kiel mi, povas esti la idealo de iu.

– Kaj Twiggy? Ĉu vi ne aŭdis pri ŝi?

Ervino akiris eksterlandan modfurnalon por kontentigi la scivoleman Esteran, kaj solidigi ŝian memfidon.

– Kaj, ĉu vi vere amas min? – demandis la junulino –, ĉar mi ne povus transvivi ankoraŭ unu trompiĝon. Ĉiu signo pruvis, ke la junulo vere amas la junulinon. Estera loĝis ĉe sia avino.

Ŝi komunikis ĉi tiun fakton jene:

– Estas inde amindumi al mi, mi loĝas kun mia avino.

– Kaj ĝenerale la avinoj ne vivas longtempe – diris Ervino reveme.

– Mi ne pensis pri tio!

– Ne ekscitiĝu, ĉar ankaŭ mi ne.

Ĝojo plenigis Esteran, kiam Ervino akceptis la inviton. Li vespermanĝis ĉe ili, la avino estis maljunulino en bona sanstato, ŝi kuiris tre bongustan vespermanĝon, ŝi elkore proponis ĝin, ĉar la junulo ekplaĉis al ŝi.

– Mi volonte akceptas vian fianĉon ĉe mi, aŭ kiel mi diru – diris la maljunulino al sia nepo post la foriro de la gasto – nur ne petu, ke mi iru en kinejon. Tio ne kongruas kun miaj moralaj principoj.

– Kio venas en la kapon de avino! Ervino jam svatiĝis pri mi. Ni anoncos ĝin en la oficejo, poste...

– Ĉi-kaze, mia filino, mi iros en kinejon. Alia afero.

Post kelkaj semajnoj la gefianĉoj sin prezentis ĉe la personara sekciestro de sia oficejo. La korpulentulo, kun interplektitaj manoj sur sia barelventro, indiferente aŭskultis la sciigon. Poste kiel krevanta bombo tiel erupciis el li la eksciteco:

– Ĉu via sana prudento iris promeni? Ĉu vi freneziĝis? Kion vi imagas?

– Mi petas vin – defendis sin Ervino –, ni volas leĝigi nian interrilaton, la socialisma moralo postulas...

– La socialisma moralo ne toleras la tiafon. Ĝi ne toleras, ke la laboruloj plenigu la konstruafon per sia senvalora parenca bando, ke ĉiu tumultigu ĉi tie sian tutan familian gregon, ke la Ĝenerala Malvarmigeja Entrepreno estu la nesto de la boparencaro, ĉiu laborulo ĉi tie edziĝu kaj edziniĝu, unu estu la parenco de la alia, la alia estu tiu de la unua, ĉiu estu la parenco de ĉiu, kiel en familio? Ĉu oni jam aŭdis ion tian?

– Do, ĉi-kaze kion fari? – demandis Estera rompante siajn manojn.

– Tion, kion ĝis nun, miaj gefiloj.

– Sed ni volas ĝin fari laŭleĝe – respondis decide Ervino.

– Ankaŭ tio eblas – glatigis malantaŭen sian hirtan hararon la personara sekciestro –, sed tiam mi translokos unun el vi al la filio en la urbo Baja.

El la hungara: D-ro István *Nagy*

Morala alegorio

R.L. Stevenson: D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde. Romaneto. Elangligis A. Goodheir. Eldonejo Kardo, Glasgow, 1980. 67 p. 20 cm. Prezo: 3,20 britaj pundoj

Hemoragio turmentis la junan Stevenson, kiam li verkis ĉi tiun „hororan" romaneton, kiu estas esence morala verko, kaj neniel ia praa scienca fikcio aŭ similaĵo.
D-ro Jekyll, vaste konata kaj respektata kuracisto havas fortan hontosenton pro siaj (cetere malmultaj) negativaj inklinoj. Li volus aperi antaŭ la homoj kiel estaĵo senmanke perfekta. Li eksperimentas pri ŝanĝoj korpaj kaj animaj, kaj fine sukcesas transformi sin mem. D-ro Jekyll disduiĝas je du homoj: unu el tiuj konservas la korpon de la origina d-ro Jekyll kun ĉiuj ties bonaj ecoj, kaj estas homo kun senmanke perfekta moralo; la alia ricevas novan – junan, sed malbelan – korpon, kaj ĉiujn malbonajn ecojn de d-ro Jekyll. Tiu „nova" homo nomiĝas s-ro Hyde.

Tiu dueco, kompreneble, kaŭzas komence nur pli-malpli gravajn problemojn, sed fine ĝi kondukas al vera tragedio.

Tiu ĉi vere leginda, ekscite interesa verko de Stevenson aperas en agrable flua Esperanta traduko de Albert Goodheir, kun la stile harmoniaj ilustraĵoj de Gillian Goodheir.

Nebulaj noveloj

Julia Pióro: Hieroglifo. Noveloj. Eldonis: TK–Stafeto, Antverpeno–La Laguna, 1979. 96 p. 20 cm. Prezo: 10,- ned.gld. (Por Hungario 100,- Ft.)

„Hieroglifo" estas la dua novelaro de la aĝa pola esperantista verkistino (ŝi naskiĝis en 1902); la unua, „El tero kaj etero" aperis en 1964 ĉe Stafeto. La forpasintaj 15 jaroj alportis malmultajn ŝanĝojn en ŝia verkado: ankaŭ tiuj ĉi noveloj estas prozaĵoj esence lirikaj; kie la rakontado akiras iom pli emfazan funkcion, ankaŭ tie gravas ne la unua plano de la eventoj, kiu fakte servas nur kiel ilo esprimi certan filozofian penson. Tiu proprajo estas virto kaj malvirto samtempe: virto, ĉar la atmosfero de la Pióro-verkoj estas ne-konfuzeble karakteriza, fantazi-move ŝveba, mistera. Sed ĝi estas malvirto ankaŭ, ĉar la noveloj de tiu ĉi volumo ne estas veraj noveloj. La simbolismo de Pióro foje estas potenca kaj frapa (ekzemple en la titoldona „Hieroglifo"), sed foje malnatura kaj banala, kiel en „La Vero": prezenti la veron per korpo de nuda virino, kaj poste konstati, ke homoj ne toleras nudecon, estas eltrovo malmulte sagaca.

Entute, la libro malmulte impresas, ja pro la manko de veraj epikaj ecoj ne kompensas la iom diluita tradicie-banala filozofio. Ĉefa fonto de ĝuo por la legantoj probable estos la bela lingvaĵo.

Elangligitaj robajoj

Omar Kajam: La Robajoj. Laŭ la traduko de Edward Fitzgerald elangligis William Auld. Dulingva (Esperanta-angla) eldono. Kovrildesegno kaj ilustraĵoj de Jean Bomford. Eldonejo Kardo, Glasgow, 1980. 50 p. 21 cm. Prezo: 2,80 britaj pundoj

La *robajoj* de Omar Kajam troviĝas inter la universalaj, kaj ankaŭ universale konataj valoroj de la mondliteraturo, fakte, kun tre malmultaj aliaj Aziaj verkoj. Literaturaj verkoj, kreitaj en ne-eŭropa lingvo, eĉ nuntempe sukcesas fariĝi parto de la internacia kaj universala kulturo tre malofte, fojefoje nur dank' al iu bonŝanca hazardo, kiel ajn geniaj ili estas.

Ankaŭ la mondfamo de Omar Kajam ŝuldiĝas al tia hazardo, nome al tio, ke la angla poeto Rossetti malkovris la tradukojn de la riĉa diletanto Fitzgerald.

Antaŭ preskaŭ tridek jaroj Waringhien jam tradukis en Esperanton la poemojn de la persa giganto – rekte el la persa lingvo. Nun Auld esperantigis la tradukojn de Fitzgerald, kiuj cetere tre verŝajne estis pli abunde legitaj, ol la originalaj persaj poemoj. Tiel ni ricevas la Kajam-ajn verkojn ne tiaj, kial ili naskiĝis, sed tiaj, kiaj konas ilin la mondo.

La 75 kvarversaj epigramoj aperas en tradukoj rafinite simplaj, en lingvo poezia tamen ne kaprompa. Tamen, ili certe ne populariĝos tiagrade en Esperanto, kiel en la angla: mirakloj ja ne ripetiĝas. La Esperanta Krilov, la Esperanta Madách kaj la Esperanta Fitzgerald restas nur tradukoj, certe bonegaj tradukoj, sed neniam ili povos havi tiun rolon, kiun Krilov, Madách kaj Fitzgerald havas en sia originala lingvo kaj kulturo. Britoj notu tion, kiam la Fitzgeraldaj–Auldaj versoj ekigos en ili tian vicon da asociacioj, kiajn en mi povas ekigi nur poemoj de Madách aŭ Petőfi – aŭ versoj el *La Vojo.*

La du poŝoj de Čapek

Karel Čapek: Rakontoj el unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo. Rakontoj. El la ĉeĥa tradukis Josef Vondroušek. Eldonis: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Prago, 1981. 285 p. 20 cm. Prezo: 11,40 ned.gld.

Antaŭ kelkaj jaroj la esperantista legantaro povis konatiĝi kun „Apokrifoj", tiuj pseŭdohistoriaj filozofiaj rakontoj de Čapek. Post tiuj forte pensigaj verkoj ni havas la ŝancon ekkoni alian flankon de la ĉeĥa grandulo: en tiu ĉi volumo estas kolektitaj liaj serene ironiaj krimhistorietoj.

Čapek ne verkis regulajn krimrakontojn: oni do neniel komparu liajn verkojn al produktaĵoj de nuntempaj „verkistoj-specialistoj" sur tiu kampo. Eklegante tiun ĉi novan eldonaĵon de ĉeĥaj esperantistoj, oni neniel do esperu fajli sian logikon kaj rezonkapablon, sed antaŭvidu legi interesajn historiojn kun ŝatinde propreca atmosfero kaj korvarmige intima grizeco – verkitajn kun kaŝita, sed tiom pli penetra artismo.

„Rakontoj el unua poŝo" estas rakontoj de policistoj, dum en „Rakontoj el la dua poŝo" krimuloj parolas pri siaj aferoj. Oni atendus akran diferencon inter la du prezentmanieroj, sed estas fakte nenia diferenco: kaj la policistoj, kaj la etstilaj krimuloj de Čapek estas antaŭ ĉio homoj, saĝaj aŭ malsaĝaj, lertaj aŭ mallertaj, eraremaj, pekemaj, sed preskaŭ ĉiam amindaj.

Vondroušek sukcese kaptis la tre karakterizan intiman stilon de tiuj ĉi verkoj: la kvardek ok historietoj de la plaĉa volumo certe akiros agrablajn leghorojn por ĉiuj aĉetontoj, kaj por tiuj, kiuj jam konas ilin per nacilingva traduko, kaj por tiuj, kiuj ĝuste per tiu ĉi Esperanta eldono malkovros por si tiujn ĉi koncizajn ĉefverkojn de Čapek.

Vilmos *Benczik*

Gaja paĝo

Brulo-bruo

– Halo, ĉu hotelpordisto? Terure! Dormi ne eblas en tia bruo!
– Mi vere bedaŭras, sinjoro! Sed ni ne povas pli mallaŭte sonorigi la fajrosignalon...

Falsa bruo

– En ĉiuj drinkejoj estas jam rakontata tio, ke oni vidis vin hieraŭ *sobra!*
– Ne kredu! Nura klaĉo...

... kaj alifoje

– Mi trinkas alkoholaĵon *nur* escepte okaze. Feliĉe, escepta okazo troviĝas en ĉiu tago...

... ĉu pro li

ĉagreniĝas tiom Elinjo? – demandis ŝia amikino. – Kredu al mi, pro nenia viro indas ĉagreniĝi. Unu foriras, venos la alia.
– Ĝuste tio estas mia zorgo! Ĉar la unu ne volas foriri...

Bona amikino valoras multe

– Karlo petis, ke mi estu lia edzino kaj mi faru lin la plej feliĉa homo en la mondo.
– Kaj kiun proponon vi elektis el tiuj? – demandis la bona amikino.

... el komercista vidpunkto

– ... Kaj ni sukcesis plene forigi la malkonfidon de la publiko – deklaris magazendirektoro al ĵurnalisto – ĉar al la aĉetantoj ŝajnas ĉiam suspektinde, se la varoj estas tro malkaraj...

ARZENALO

magazeno de rapide mortigaj venenoj.

BIGAMIO

insulo inter Monogamio kaj Poligamio en Polinezio.

MAJONEZO

ano de flava gento, vivanta inter la melanezoj kaj singalezoj. Ili manĝas nur ovon kaj oleon.

ELZEVIRO

la presista membro de la triumviroj en la antikva Romo.

MODERNA TEATRO

la aktoroj en via loĝejo dankos pro la aplaŭdo!

... ankaŭ tiel

– Mia fileto ne emas manĝi... Tial, imitante la hotelojn, ankaŭ mi enkondukis hejme la devigan matenmanĝon, diris la ruza patrino.

Sekve okazas...

– Kelnero! unue mi ne petas supon. Poste proponu ian viandaĵon, kiun mi same ne mendos...

Eble li konfesis tion

– Kiel ege mi estus ĝuinta en mia knabaĝo, se mi trovas nudan virinon en la banĉambro... sed nun ĉiumatene mi koleras pro tio... – meditas la edzo antaŭ la banĉambro.

Aĉa filmo

– Ho! Eklumigu la lampojn en la spektejo! – kriis la spektanto en la kinejo. – Tiam ni povos almenaŭ kartludi dum tiu filmo...

Altsukcesa artisto

– Mi tre bedaŭras, sed mi povas akcepti kontrakton nur por la venonta jarcento!

... kaj sukcesa ŝoforino

– Kiel bone lernis via edzino la stiradon?
– Grandioze! La vojoj jam kondukas preskaŭ tien, kien ŝi volas veturi.

... kaj sukcesa ĉasisto

Li rakontas: La vulpo estas ege ruza besto! Foje mi postiris iun vulpon la tutan tagon, kaj kiam fine mi sukcesis pafi ĝin, evidentiĝis: ĝi estis hundo!

Imagoj de magoj

Divenistoj kaj magoj konferencas, prifuturas. Kelkaj vizitas dum paŭzo futbalmatĉon. Abrupte unu ekkrias: Tiu golo, tiu ĉi, jen, ho! Ĉu vi ne vidas? Tute la sama, kiel en la finalo de la 1986-jara Mondĉampionado!

Imago de bopatrino

– Mi teruran sonĝis: mia filino edziniĝis, kaj vizitis ŝin sinjoro, kiu volis paroli kun la juna edzo.
– Tio ja ne estas ia terura.
– Sed mia filino mangestis al la suba ludplaco, montrante la edzeton sur la balancileto...

E.F.

Korespondi deziras

Pri antikva orjento, Samarkando, volonte respondas (certe) Jakub *Ŝamŝiev,* SU-703000, *Samarkand,* poĉtamt pk. 30, interŝanĝ. E-librojn, revuojn kontraŭ bk, afiŝoj, prospektoj A, G, F, ktm, pĉt. – Studento Jaroslaw *Górniak* (22) ktm, pri sporto, muziko, kino, teatro, interŝanĝas bk, diapoz, foto, diskojn. PL-45-056 *Opole* Pl. Lenina 6/80. – F-ino Gloria *Beltran G,* studentino, pri naĝado, promenado, k.a. Venezuela, *Caracas 1070,* Resid. „Ana Teresa" Piso 2, no. 21. Calle 15. – F-ino Ildiko H. *Gallo K,* studentino pri muziko, k.a. Venezuela, *Caracas 1060,* Calle La Joya, Edif. Joya, apt. 16. – Pri Eo kaj internaciisma eduko de infanoj kol. materialojn, interŝ. spertojn Aleksandro *Kalaŝnikov,* SU-334 265 *Artek,* Krimeo, do vostreb. – Turismo, montgrimpado, sporto, literaturo k.a. kun gejunuloj *Biró* Zoltán (18) Rumanio-4100 *Miercurea Ciuc* (Harghita), Alea Ciocirliei 2, ap. 11. – Sporto, muziko, lingvoj interesas lernantinon *Traks* Tiia (17), SU-Estonio 202 331, *Salla.* – *Markevičiuté* Algima (22) studentino kemia, kun komencantoj, SU-Litvanio 232 040 *Vilnius* Medžiotoju 18. – S-ino Aura R. *Romero* pri leĝoj, muziko, k.a. Venezuela, *Caracas 1050,* Las Palmas, Av. Maracay, Qta Aurimar. – S-ro Eduardo Medina *Morales* pri muziko, k.a. Venezuelo, *Caracas 1070,* Resid. California Norte, Edif. 3, Piso 15, Apt. 151. – Sergej *Ŝaŝmin* (16) ktm, pĉt, SU-454 112 *Ĉelabinsk* P-t Pobedi 306/104. – Pri geometrio, arkitekturo, matematiko, medicino, kuracherboj, fotografio, kuirarto, jogo, ktm, pĉt, Tadeusz *Smykalski,* PL-42-200 *Czestochowa* str. Slowackiego 9-125. – Pri muziko, foto, belarto, literaturo, turismo, interŝ. diskojn, foto-revuojn, k.a. recipr. gastado, Jurij *Samoĥvalov* (22) studento de radioinstituto. SU-630017 *Novosibirsk* str. Bogatkov 193, loĝ. 6. – *Teder* Leo (56) kaj filo Madis (17) serĉas korespondamikojn. Interŝ. pm, pk, ins, diskojn k.a. Estonio, SU-203 622 *Kilingi-Nómme,* Sovhoz Nómme. – Bogdan *Gnywna* (39) ktm, pri jogo, kosmologio, radioestezio, parapsiĥologio, ankaŭ antikvaj filozofioj, arkeologio, religioj, vojaĝoj, interŝ. pri tiuj revuojn, librojn. PL-91-030 *Lódz* ul. Woronicza 10-44. – *Naturista Somero* okazos ĉe lago Velencei en 1982, 5-15 aŭgusto. Urĝa lokrezervo nepra ĉe: Kemping aŭ Hotel Agárd, H-2484 *Agárd.* Aliĝilojn ĝis marto sendu al s-ro László *Molnár* (INOE), H-8000 *Székesfehérvár* Nagyváradi u. 11. – E-Rondeto de internacia junpionira tendaro ekspozicios lernolibrojn kaj porinfanajn librojn en Eo. Rekompencos laŭ interkonsento (albumoj, bk, pri Krimeo ktp). „Rondeto de Esperanto" SU-334 165 *Artek,* Krimeo. – Agronomo *Kiss* Gábor (27) en kooperativo, precipe kun ges-anoj en Hispanio, Ĉinio, Vjetnamio, Japanio, pĉt. H-5945 *Kardoskút* Rákóczi TSZ. – S-ro Suran *Batzajalgaas,* lernanto, RP Mongolio, *Ulanbator* N.R. 30-a Surguulini 7a angi; interesiĝema komencanto pri Eo, movado, pri multaj temoj. – Vajda *Ioan,* (30) Casuta postala 91, 2200 *Brasov* 1, Rumanio, programisto, deziras korespondi interŝanĝi pm. E-glumarkojn. Respondo certa, bonvolu afranki filatele. – Komencanto, (27) deziras kor. p.ĉ.t. prec. pri muziko (ĵazo), kol pm, bk, Matthias *Reimann,* DDR-5503 *Ellrich,* Bahnhofstr. 32. GDR.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Ĉu vi volas valoran, belan donacon?
Hungara Popolarto en 80 vendejoj en Hungario!
Servo por klientoj: 184—697

NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT

Principoj

Mi citas el la antologio „El Parnaso de popoloj" la duan strofon el poemo de Aleksej Tolstoj, en traduko far Grabowski. La citaĵon vi trovos en linioj: H.1., V.1., V.14 kaj H.59. (Ensendendaj linioj.) Limdato: unu monato post alveno de la revuo

Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: 8. Delikate kaj ame tuŝetas. 15. Igos enen. 16. Reen: sekvas post la sepa. 18. En varma sezono. 19. sidlokoj sur rajdbestoj. 20. Proksime, najbarece. 22. Larĝa apogseĝo por pluraj (R). 23. Ceremonia kapvesto de papoj (R). 24. Rivero en Sudameriko (ne Esperanta ortografio). 26. Havanta nenian korpan difekton. 27. ADT. 28. Kuiros (ekz. panon) en forno. 29. Filo sen gepatroj (R). 31. Nia planedo (R). 32. Greka litero. 33. Identaj konsonantoj. 34. Komenciĝis. 36. Supernatura estaĵo. 38. Lirika poemo (R). 39. Instrui pri konduto (R). 41. Poseda formo de persona pronomo. 43. Ŝati kare. 45. Afabla. 49. Lando en sudoriento de Araba duoninsulo (R). 51. Reen: fari nedifinitan agon. 52. Spicita per natria klorido. 54. Vigle plezuri. 56. Moviĝi ien. 57. Respektoplenaj al religiaĵoj. 60. Mallaksigi (R). 62. Radiko de Hor. 26. 64. Serio de nomoj (R). 66. Moderna aviadilo. 67. Sufikso montranta la kolektivecon. 69. Geografia karto (R). 71. Malmola minerala maso (R). 73. Kiel H. 33. 74. Sufikso esprimanta kolekton. 75. Vorto farita el H. 74. 77. Grekortodoksa pastro (R). 79. Nobel-premiita angla verkisto. 81. Sulfuro kaj natrio. 82. Kruda besta haŭto. 84. Ĝi altiras feron. 86. Facile fandebla metalo (R). 87. Efektiva rezultato de ago. 89. Sin movi reen. 90. Esti en iu situacio. 91. Ne ĉiutagaj gazetoj. 93. Reen: loko, spaco por io. 94. Scienca aserto evidentiga per rezona pruvado. 95. Profetaĵo, aŭguro.

Vertikale: 2. Epopeo de Vergilio. 3. Plivastigi (ekz. amplekson de substancoj) (R). 4. Rusa virnomo. 5. Legomo grajnohava, riĉa je grasoj (R). 6. PS. 9. Verba finaĵo. 10. Tre granda ŝtono (R). 11. Inklinas. 12. Alta leĝofara instanco (R). 13. Ret-teksanta besteto. 17. Lirika poemo. 20. Ŝipo de Noah en Biblio (R). 21. Karakteriza trajto, propreco. 24. OA. 25. Regula araĝaĵo de aferoj (R). 28. Aŭdigis konfuzajn sonojn. 30. Abomeninda. 33. Samspecaj literoj de reduto. 35. Kolekti trupojn ĉirkaŭ fortikaĵo (R). 37. Mezurunuo de elektra rezistanco. 39. Malplezuras pro senintereso. 40. Dividaĵo de socio (R). 42. Speciale paŝi en ŝakludo (R). 44. Ago, fari same kiel iu. 46. Havi inklinon. 47. Du prepozicioj. 48. Interjekcio por esprimi bedaŭron (dufoje). 50. Kanto en opero (R). 53. Surmurigita sciigo (R). 55. Ne havanta propran movon (R). 58. Tempa adverbo. 61. Cent – en kelkaj slavaj lingvoj. 63. Legomo kun manĝebla radiko (R). 65. Em' por elteni ion. 68. Plišati (R). 70. Frukto (R). 72. Kunigi per ronda metala najlo. 74. Solena eklezio malbeno (R). 76. Koncerna frukton, kiu liveras oleon. 78. Du samspecaj objektoj (R). 80. Identaj vokaloj. 81. Resti senmove. 83. Reen: franda bakaĵo. 85. Grekdevena vorteto en kunmetaĵoj signifanta teron. 86. Longa ornamo sur pastra vesto (R). 88. Identaj vokaloj. 90. Prepozicio. 92. Konsonantoj de la sepa monato. 94. Tiel komenciĝas nia planedo.



Solvo de la krucenigmo en n-ro 1981/2: PENSOJ IRAS TRANS LIMO SEN PAGO KAJ TIMO –– PERDIĜAS PER PRUNTEDONO AMIKO KAJ MONO.

Libropremion gajnis per lotumado: Eduard V. *Tvarožek*, Trenčin, CS; Róza *Halász*, Salgótarján, H; Nikolao *Grišin*, Ventspils, SU-Latvio. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Per „Hungaraj fabeloj" Maria Benczik donas al la vasta Esperanto-legantaro modestan specimenon el la kreado de Elek Benedek, kiu dediĉis sian plumon al la infanoj:

1. Kiel nomiĝas la filino de la reĝo de Felando?
2. Kiu vorto estis skribita sur la pordofosto en la fabelo „La maljunolino kaj la morto"?
3. Kiu fabelo finiĝas per la frazo: „Kiu ne kredas, do kontrolu ĉion."?

La limdato por la sendo de la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo:

LETERKESTO

Osias, S., R. *Bukareŝto:* Pro la elstara graveco de la *Fundamento,* ni plene konsentas kun via profunde amara plendo kontraŭ tiuj, kiuj tendencas devalorigi la Fundamenton kaj taksi ĝin „arĥaisma". Ĝia unuiga rolo malhelpis dum la jarcento, ke Eo dialektiĝu, kaj disfalu sub diversaj premoj. Tiel ĝi forte kontribuis al ekzisto kaj disvastiĝo de IL tra la tuta mondo. Kvankam ie-tie troviĝas deziroj enkonduki novajn gramatikajn regulojn, tion ni konsideras pli signo de vivanteco de la lingvo, ol efektiva danĝero: oni povas fidi – malgraŭ la troigaj proponoj – la „sanan", laŭ-Fundamentan evoluon de Eo. Kaj tio bezonas ankaŭ similajn dankindajn elpaŝojn, kiel la via!

Aivar Liepiņš, SU-Latvio, *Madona:* La ricevita gazeto „Sports" publikis nian intervjuon kun *Pelé,* faritan dum lia film-aktorado en Budapeŝto –, kaj ni kun plezuro rimarkis tiun lertan propagandan agon de via E-klubo. Ankaŭ vi opinias, ke la por-esperantaj vortoj de la famega futbalisto plurloke trovis la vojon al la nacilingvaj sportgazetoj, eĉ se nur kelkaj informoj venis al ni.

D-rino Kisházi Margit, H. *Hódmezővásárhely*: Estas ja memkomprenebla afero, karega legantino, via rajto kritiki nian revuon; kaj se vi abonas ekde ĝia unua jaro, la rajto jam transformiĝis eĉ je *devo:* sekve ni plendos pro nekritiko! Kaj koncerne la konfuziĝon de la malfeliĉaj kolumnoj sur paĝo 56, ni povas nur tordi la manojn, petante indulgon de la paciencaj legantoj pro la neplanita enigmo! Bonŝance, sur la sekva paĝo jam regule sekvis la informoj pri L. *Németh,* kies iaman domon, nun muzeon, vi mem prizorgas.

Matveev Vladimir, SU, *Vladivostok:* La fondon de Scienca Klubo de Eo en la fora Scienca Centro de la Scienca Akademio, ni salutas kompreneble kun granda plezuro! Des pli, ĉar nuntempe kreskis la bezono de IL en la scienca mondo, kion akcele komencas sekvi jam ankaŭ nia agado. La nivelo kaj la surpriza nombro de scienc-teknikaj prelegoj dum tiucela internacia E-Konferenco en Slovakia Žilina klare reliefigas tion. Por E-literaturo en Hungario vi povas turni vin i.a. al la librovendejo „Družba" en Moskvo –, kaj ni esperas vidi en baldaŭa venonto ankaŭ E-lingvajn verkojn de viaj klubanoj.

Miriam Colombo, I. *Milano:* Via „parenca opinio" pri H.V. en la vaste legata „Bulteno KEC" el Milano, je nia granda kontento plaĉe renkontis niajn redaktajn ideojn. Montri kio estas montrinda pri Hungario kaj „laŭ originala vidpunkto trakti E-ajn aferojn" precipe „por praktika uzado de IL", kiel vi observis kaj koncize konceptis – jes, tiel ni deziras direkti nian ŝipon. Devas helpi ankaŭ la de vi ŝatata kolora grafika aspekto, la bildoj, fotoj k.a. La konsilo, pritrakti ankaŭ „tutmondajn temojn", ekz. virinan situacion, politikon, kaj similajn, ne estas fremda al ni. Akceptu nian dankon pro la bone fundita analizo pri nia revuo.

Istomin K.S., SU, *Leningrad:* Tiaspeca artikolo, sendita de vi, devis esti bonvena bontempe, t.e. por publiki ĝin komence de la lerneja jaro, somerfine... la redakcio tamen estas dankema leginte ĝin, kvankam tro malfrue ĝi venis en niajn manojn. La filozofion, la studadon oni ne povas sufiĉe glori antaŭ lernantoj. Estas alia afero, ĉu artikoli pri tio en revuo nur abstrakte, aŭ pere de „pli proksima", pridiskutata temo? Ŝajnas al ni, ke la lasta estas la preferinde ĝusta maniero.

Jelizarov Aleksandr, SU, *Sizran:* Viaj karesaj vortoj pri la grandaj hungaraj E-verkistoj estas ne nur kutimmaniere dankindaj: ni komprenas el ili vian profundan amon al la Ea kulturo kaj al tiu internacia, humanisma sento, kiu plenigis kaj disvolvis la spiriton de ilia verkado. Ni klopodas sekvi ilin, kaj laŭ via bondeziro, energie kaj bonhumore labori kaj redakti plu.

Erika Beier, Aŭstrio, *Hall in Tirol:* Por helpi vian lumbildparoladon ni sendis laŭdezire iom da materialo, kelkajn tekstojn kun ne trouzitaj direndoj pri Hungarlandaj pejzaĝoj kaj moroj.

Erős Lajos, H, *Szolnok:* Poemon elspiri estas granda donaco por la personeco, kaj bezonas ne-etan energion mensan. Enhavo kaj formo nur kun granda peno kuniĝas, tion vi certe forte sentis dum viaj provadoj. Grave helpas tiurilate la diligenta legado de poemoj: ne de kelkaj, sed de multaj, jes, multaj kaj diversaj. Instruo de granduloj kondukas plu: ni rekomendas tiucele la nedikan kajeron de Kalocsay „ Kiel verki kaj traduki poemojn? " pro la utilaj kaj necesaj konsiloj.

Martinoviĉ Julia, SU, *Lvov:* Ŝajnas al ni, ke la rimoj tro katenas vin por ekspliki viajn pli profundajn pensojn; eblas fari provon ankaŭ sen ili aŭ kun malpli, ĉu? La supra respondo rilatas iomete ankaŭ al vi: legi kaj studi multajn poetojn!

Banaitis Valdas, Litovio, *N. Vilnia; f-ino Karin Dodu,* R, *Timisoara; Glozman Boris,* SU, *Zaporofe:* apud la publikita „daŭrigo" la viaj prezentis la plej spritajn solvojn por la ne tro „Fidela edzo" – domaĝe, nia spaco ebligas publiki nur unusolan. Akceptu nian dankon pro viaj klopodoj.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** Arta redaktoro: **Éva Tatár-Farkas.** Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193, H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gezetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96–162. 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA P.O.B. 149, H–1389, Budapest. Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro.
Indexszám: 05 377 ISSN 0018–7704

hungarocoop

Hungariajn geknabajn vestojn
por aĝo 2–12 jaroj eksportas:

HUNGAROCOOP
H–1370 Budapest 5.
P.O.B. 334

Valoraj
artobjektoj

porcelano
de bona marko

stilmebloj

Varojn
aĉetitajn en la
subaj vendejoj
oni povas
sendogane
elporti
el la lando

VI POVAS AĈETI
EL GRANDA
SORTIMENTO
KONTRAŬ VALUTO
INTERNACIE
ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

BÁV